

2.ª EP. AÑO XIII N.º 73 (210) JULIO - AGOSTO 1975

Boletín

DE LA FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO

LERIDA KONGRESURBO POR 1975



Antikva Seo. Klostro

**BOLETIN DE LA FEDERACION
ESPAÑOLA DE ESPERANTO**

Director:

Domingo Martínez Benavente

Redacción y Administración:

Inés Gastón

Paseo Marina Moreno, 35, 4.º dcha.
ZARAGOZA-1

ADRESOJ

Federación Española de Esperanto
(Hispana Esperanto-Federacio)
Oficina Central:

Str. Rguez. S. Pedro, 13, 3.º, des. 7
MADRID-15

Prezidanto:

S-ro Angel Figuerola Auque
Str. Víctor de la Serna, 19, 7.º
MADRID-16

Sekretario:

S-ro José M.ª González Aboín
Oficina Central:
Str. Rguez. S. Pedro, 13, 3.º, des. 7
MADRID-15

Kasisto:

S-ro Gerardo Flores Martín
Str. Presidente Carmona, 2
MADRID-20

Ĉekkonto: N.º 8362-271
Banco Español de Crédito
Str. Diego de León, 54
MADRID-6

Libroservo:

Federación Española de Espe-
ranto, O. C.
Str. Rguez. S. Pedro, 13, 3.º, des. 7
MADRID-15

Informa-servo:

Federación Española de Espe-
ranto, O. C.
Str. Rguez. S. Pedro, 13, 3.º, des. 7
MADRID-15

Eldona Fakoj:

F-ino Inés Gastón
P.º Marina Moreno, 35, 4.º dcha.
Ĉekkonto: N.º 17917, Bc. Bilbao
Coso, 31 ZARAGOZA-1

Jarkotizo por eksterlando: 200 ptojn.

La enhavo de la artikoloj ĉi tie pu-
blikigitaj ne reprezentas la oficialan
opinion de H.E.F., escepte en okazo
de oficiala komunikado; ĝi ankaŭ ne
reprezentas la opinion de la Redak-
toro; do, pri la artikoloj responde-
cas la aŭtoroj mem.

**DONANTES DEL FONDO DE ADQUI-
SICION DEL LOCAL EN PROPIEDAD
(F.A.L.P.)**

Pesetas

Suma anterior 365.392,—
Ramón Molera 1.450,—
En memoria de M.ª G. M. 50.000,—

Total 416.842,—

Madrid, 10 de junio de 1975.

Gerardo Flores

Tesorero de H.E.F.

deziras korespondi

BULGARIO.—Ŝumen-2, str. Jeĉko Jor-
danov 19, ap. 8, F-ino Penka Peneva
studentino deziras korespondi kun
hispanaj esperantist(in)oj.

BULGARIO.—Ŝumen-C, str. Otec Pai-
sij 36, F-ino Totka Dobрева, studen-
tino deziras korespondi kun hispanaj
esperantist(in)oj.

BULGARIO.—Varna, str. Bdin 4, S-ro
Emil Cvetkov, ekonomisto deziras
korespondi kun hispanaj esperan-
tist(in)oj.

BULGARIO.—Veliko Târnovo, str.
Gurko 3 A, S-ro Ilija N Vladov dezi-
ras korespondi por interŝanĝi Espe-
rantajn glumarkojn kun hispanaj es-
perantist(in)oj.

BULGARIO.—7.840 v. Opaka, str. Târ-
govište d., F-ino Antoaneta Nikolaeva,
lernantino en Gimnazio deziras ko-
respondi kun hispanaj esperan-
tist(in)oj.

BULGARIO.—Stara-Zagora, str. Gurko
51, S-ro Kuman Kumanov, veterinaro
deziras korespondi kun hispanaj es-
perantist(in)oj.

Por ekspozicio pri la Internacia
Lingvo ĉe la Vroclava porpastra semi-
nario kaj por organizata Ekumena
Esperanto-Biblioteko, sendu donace
ĉiuspecajn esperantajojn kaj diapoziti-
vojn pri religia arto al: dac. Ladislao
Kloc, pl. Grunwaldzki 3, PL 50-377
WROCLAW (Pollando).

A T E N T U !

KONGRESA MARETIALO

En pasinta numero de BOLETIN, la
prezo de la kongresa materialo estas
erara. Do, jen la valida prezo:

Poŝtkartoj, unuo 5,— ptoj.
Folietoj ses glumarkoj, unuo 5,— ptoj.
Kovertoj, unuo 5,— ptoj.

CONSIDERACIONES DEL PRESIDENTE DE LA FEDERACION ESPAÑOLA
DE ESPERANTO ANTE LA PROXIMIDAD DEL XXXV CONGRESO
ESPAÑOL DE ESPERANTO, A CELEBRAR EN LERIDA DEL
18 AL 22 DE JULIO

Por primera vez en la historia del Movimiento Esperantista Español, la ciudad de Lérida, sede del XXXV Congreso Español de Esperanto, va a tener la ocasión de apreciar experimentalmente, durante los cinco días que ha de durar el Congreso, esto es, del 18 al 22 de julio, la realidad de valor incontrovertible de una lengua universal apta para suprimir el obstáculo de las barreras lingüísticas, y devolver a la humanidad del futuro, la unidad lingüística añorada por el hombre de todos los tiempos, desde su irreparable pérdida en virtud del castigo bíblico (Génesis XI-1), que imperó sobre la tierra desde los albores de la vida del género humano hasta el momento impreciso en que surgió la incógnita inextricable, que originó la diversificación de las lenguas, motivo condicionante, a lo largo de la historia de la humanidad del enrarecimiento persistente y paulatino de las relaciones humanas, conducente a educir y mantener alerta el espíritu de incomprensión y hostilidad generador de las tensiones desencadenantes de las guerras, que casi ininterrumpidamente y aún simultánea a veces, han constituido en gran parte el quehacer de los hombres y de los pueblos, y que si bien es discutible su función necesaria como factor impulsor del progreso, no por eso dejan de ser causa de sufrimiento y desolación enraizando el egoísmo y determinando la falta de entendimiento entre los hombres. No obstante, es tan radical para los seres humanos la necesidad del entendimiento recíproco y de un sistema de comunicación que garantice su posibilidad, es necesario señalar, que pese a la acción de todas las fuerzas contrarias a ese entendimiento recíproco anhelado por la humanidad, siempre han existido, en los diferentes períodos históricos, lenguas internacionales de extensión limitada; a modo de sucedáneos culturales destinados a calmar la angustia latente en el fondo del corazón humano, consecuencia de la irreparable pérdida de la primera lengua común a todos los hombres, o de la necesidad de un instrumento universal de comunicación que sirva de vehículo a la expresión de su pensamiento por medio de la palabra. Sin embargo, esta aspiración, desde mediados del siglo XIX, el hombre moderno, a pesar de que su ofuscación, no le permite tomar conciencia de ello, puede considerarse realmente superada mediante la creación por el Doctor Luis Lázaro Zamenhof del idioma "Esperanto" y haber alcanzado éste el rango de invento social, avalado por el juicio favorable, en tal sentido, de un número creciente día a día de hombres de ciencia.

El XXXV Congreso Español de Esperanto va a brindar la oportunidad y ser motivo de que Lérida pueda tomar conciencia de que el Esperanto no es una utopía según afirman arrogantemente no pocos intelectuales presumidos o pseudointelectuales, ni tampoco un proyecto trasnochado de lengua universal que no la habla nadie, sino una lengua viva, auténticamente internacional por su estructura racional, por su claridad, elegancia y flexibilidad para *reificar* los pensamientos por su fácil aprendizaje, por las inagotables posibilidades de su vocabulario y por su fisonomía peculiar y función específica, puesto que siendo idéntica a las demás lenguas habladas, en cuanto a sus materiales constitutivos, es distinta por su adecuación para coexistir con todas ellas y evolucionar sin interferir su normal desenvolvimiento; cumpliendo así cabalmente la finalidad de su existencia: Ser lengua común neutral, utilizable para todos los hombres de conformidad con las exigencias de las circunstancias.

Antes de pasar adelante, debo señalar que las consideraciones formuladas, así como las que puedan seguir acerca de lo que cabe esperar con razonable optimismo del XXXV Congreso Español de Esperanto, en lo concerniente al objetivo fundamental de la razón de ser de la Federación Española de Esperanto, del Movimiento Esperantista Español y de los Congresos Españoles de Esperanto, que no puede ser otro más que la difusión y afirmación del Esperanto, siguiendo directrices inspiradas por el principio de respeto a la neutralidad, fundamento del Movimiento Esperantista Español para el logro

de la consecución de sus fines, no son meras fantasías de mi imaginación, sino que descansan en los resultados obtenidos año tras año como fruto debido a la labor continuada de la Federación Española de Esperanto, llevada a cabo, en gran parte, por sus Secciones, las Sociedades Federadas de ámbito local provincial o regional y del entusiasmo inagotable de los esperantistas y simpatizantes, a quienes cabría aplicar justamente el dicho popular, algo modificado, para aplicarlo al caso concreto que nos ocupa, de ser jueces, partes y contribuyentes, con carácter general, en todos los acontecimientos esperantistas: sencillos o importantes. Milagro operado gracias a la circunstancia de que entre los esperantistas de todos los tiempos, desde el nacimiento del Doctor Zamenhof hasta nuestros días, no han faltado los idealistas, artífices de nuestro movimiento y sumamente necesarios hasta que los Estados y las Instituciones supranacionales se decidan a tomar a su cargo la enseñanza, aplicación y utilización del Esperanto. Lo que, sin duda alguna, ha de producirse en un futuro no lejano como consecuencia del progreso técnico en los medios de comunicación e información. Puesto que no es posible contemplar la historia del Movimiento Esperantista Mundial sin admirarse de la vitalidad del esperanto, de la obra realizada por los esperantistas y de la fe necesaria desenvuelta para alcanzar tales resultados. La consideración de estos dos hechos justifica todo sacrificio consumado para favorecer la consecución de los fines del movimiento esperantista, tanto en España como en el extranjero; no siendo pequeña la contribución prestada asistiendo a los Congresos de Esperanto, bien sean estos nacionales o universales, porque su asistencia supone participación en la responsabilidad común, a fin de evitar todo posible fracaso o menoscabo, e implica garantía del éxito del mismo. De ahí, que como Presidente de la Federación Española de Esperanto, me vea cada año precisado a rogar encarecidamente a los Esperantistas españoles y simpatizantes su adhesión y participación en las tareas de los Congresos. Lo que hago hoy también con plena confianza en el éxito, basado en la gestión seria y eficaz del Comité Local Organizador del XXXV Congreso Español de Esperanto, en el programa de Actos de dicho Congreso, lleno de interés en cada una de las tres facetas acostumbradas que abarcan las actividades de los Congresos Españoles de Esperanto y en los sugerentes atractivos y hospitalidad incomparable de esta singular ciudad de gran abolengo histórico que se extiende más allá de la época pre-romana y que ahora nos aguarda para constituir con su contribución unida a nuestro esfuerzo un nuevo escalón en la trayectoria histórica del Movimiento Esperantista Español.

Angel Figuerola

RESULTADOS DE LOS EXAMENES DE ESPERANTO QUE CON MOTIVO DEL XXXIV CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO SE CELEBRARON EN VALLADOLID EL DÍA 20 DE JULIO DE 1974

La comisión examinadora ha notificado a esta Secretaría los siguientes resultados.

Aprobaron el curso elemental (Kapabla Esperantisto) los siguientes señores:

D. Oscar Puig Cánovas, D. Héctor Puig Cánovas, D.^a Isabel Comesaña Lago, D. Jesús Iglesias López, D. José Juan Deniz García, D. Leandro Trujillo Casañas, D. Jesús Pérez Caballero, D. José Manuel Freitas y D. Miguel Gutiérrez Adúriz.

Aprobaron el segundo curso (Esp. instruisto) los siguientes señores:


D. Miguel Gutiérrez Adúriz, D. Miguel Angel Altuna Aspiazu, D. Augusto Casquero de la Cruz, D. Pedro Benedicto Alvarez, D. Rodolfo Canet Marín y D. José Manuel Freitas.

Los señores que figuran en la presente relación, así como los que aprobaron en exámenes anteriores y no se hallen en posesión del diploma correspondiente (independiente del certificado de aptitud), pueden solicitarlo a la Secretaría de la Federación y les será enviado contra reembolso. Su precio es 100 pesetas.


Madrid, 10 de junio de 1975.

Héctor Figuerola

IOM PRI NIA ĈI-JARA KONGRESURBO



Enrique Granados: hispana pianisto kaj komponisto, naskiĝis en Llerida en 1867, mortis en 1917. Fama aŭtoro, interalie, de la opero "Goyescas". Jen la monumento, kiun Llerida dediĉas al sia elstara filo.



Stuparo kaj klostro de la antikva Hospitalo Santa Maria, belega konstruaĵo de la XV.^a jarcento, kiu nun estas sidejo de la Provinca Arkeologia Muzeo, de la Publika Biblioteko, de la Instituto de Ilerdensaj Studoj, kaj cetere. Do, nia Kongreso okazos en ĉi tiu bela kaj interesa konstruaĵo.

1.ª HEJS - tendaro

Dum la pasinta Paska Semajno kvindeko da gejunuloj renkontiĝis en Zaragoza kampadejo por partopreni la I-an HEJS-tendaron.

La programo, se tiel ni kuraĝas nomi ĝin, kontentige disvolviĝis. La 27-an jaŭdon, okazis la "interkono" de la tendumontoj, kaj la malplej alloga programero, t. e., la petego al la homoj, ke ili partoprenu la vendredan ekskurson al "Monasterio de Piedra". Tio ĉi vere riskis ruinigi niajn financojn, ĉar tre malmultaj projektis ekskursi, kio kaŭzus grandegan deficiton. Feliĉe, preskaŭ la tuta partoprenantaro reagis, kaj ni povis ĝoje viziti tiun lokon.

Ja estis tiu ĉi la plej bona, preskaŭ la unika-programero, kaj ĝi utilis por kunigi ĉiujn en konvena ejo: la aŭtobuso. La belega pejzaĝo de "Monasterio de Piedra" vere ravis nin ĉiujn per siaj multaj akvofaloj. Ni povis krome profiti la aŭtobusan vojaĝon por eluzi nian ĵus eldonitan "Hispana Kantareto", kiu enhavas tradukojn de hispanaj kanzonoj kutime uzataj en ekskursoj. Ja ĝi estis utila, kaj, post ekzercado, ni povos kanti niajn ĉiamajn kantojn en la internacia lingvo. Dum la vespera halto en Calatayud, la delegitoj kaj estraro kunsidis por pretigi la ĝeneralan kunvenon de la sabato.

Tiam, kiel dirite, okazis tiu ĉi. La loka grupo disponigis sian ejon al ni. Dum tiu ĉi kunsido, oni informis la membrojn pri la nuna situacio de HEJS, pri nia jarraporto kaj la projekto de regularo prezentita al HEF-estraro. Alia temo estis la financa raporto, kiu postulis plialtigon de la kotizoj. Tiuj ĉi estas fiksitaj je 150 ptoj por la venonta jaro. Ni parolis ankaŭ pri la aktivado de la delegitoj, laborprogramo, kaj starigo de HEJS-gastiga servo. Por la venonta tendaro, ni elektis Santander.

Vespere, je la 7.ª, la Zaragoza grupo malavare regalis nin. Ja tio ĉi estas vero, ĉar ni poste ne vespermanĝis. La varma akcepto honorigis nin perme-sante nian subskribon en la ora libro de la grupo. Ĝis nun, tiu ĉi honoro estis nur por eksterlandaj samideanoj.

Dimanĉe, nenio okazis, krom la fotado kaj la adiaŭa plorado. Pri nia restado, se la zaragozanoj varme nin akceptis, ni ne povas diri la samon pri la vetero. La malvarmaj ĉetendaj noktoj certe kreis pli ol unu kataron. La projektitaj noktaj kampafroj ne estis eblaj, kaj ilin anstataŭis vagaj promenadoj kiuj neeviteble finiĝis en la stacia trinkejo.

Resume, malgraŭ ĉiuj organizaj mankoj, la bilanco de tiu ĉi renkontiĝo estas tre pozitiva por nia estonteco. Fine, ni esprimu niajn sincerajn dankojn al la Zaragoza samideanaro, kaj speciale al la HEF-estraro, S-ro Ortiz Gratal, kiu helpis nin en la organizado de la ekskurso kaj logado.

Miguel Angel Altuna

HEF - JUNULARA RESTADEJO ESPERANTISTA - HEJS

Monistrol de Montserrat

Konstanta adreso:

S-ro S. Aragay, Bassegoda, 40, 3.ª, 1.ª
Barcelona. Telf. 333.80.81

Denove dum la venonta somero, la JUNULARA RESTADEJO estos malfermita por ĉiuj esperantistoj. Pro tio ni deziras klarigi al vi, ke finfine, oni finis ĝian konstruadon. Ĝi konsistas nun el tri dormoĉambroj, kuirejo kaj manĝejo, provizitaj per elektra servo. Ankaŭ el naĝo baseno kies mezuroj estas: 6,5 × 3,5 × 1,8 metroj.

Kun la celo faciligi la gastigadon ni informas ke dank' al la kunlaborado de pluraj esperantistoj nia JUNULARA RESTADEJO estos malfermita ĉiutage dum la monato aŭgusto.

Nur restas diri ke ni atendas vian ĉeeston; tiel do bonvolu mendi anticipe la koncernajn rezervigojn. Dankon!

VIIª FRANCA-HISPANA ESPERANTISTA RENKONTIĜO

La jam tradiciaj Renkontiĝoj inter esperantistoj el ambaŭ flankoj de la Pireneoj okazis kun granda sukceso en Huesca, ĉefurbo de la Alta Aragono, la 9an, 10an kaj 11an de Majo.

Aranĝis la eventon, la Hispana Turisma Esperanta Sekcio, kies Prezidantino estas la ĉiam laborema kaj nelacigebla Inés Gastón. Antaŭ ol mi raportos pri la diversaj okazintaĵoj, mi deliras emfazi la eldonon de turisma broŝuro pri Huesca de la internacia lingvo, kiu, laŭ mia opinio, estas ja la plej bela ĝis nun Esperante eldonita en nia lando.

En la VIIª Franca-Hispana Esperantista Renkontiĝo partoprenis gesamideanoj el Huesca, Zaragoza, Barcelona, Bilbao, Lérida, Santander, Valladolid kaj kelkaj, bedaŭrinde ne multaj, el Francujo kies nombro estis rondcifere 100 personoj.


Por ke vi estu kiel eble plej bone informitaj, mi priskribos, daton post dato, la diversajn erojn de la Renkontiĝo.

9an de Majo. — Je la 20,30 en moderna kaj komforta aŭditorio de la Instituto “Genaro Poza” okazis hispanlingva prelego de Sro. Fernando de Diego pri “El Esperanto y su entorno”. Prezidis Lia ekscelenca moŝto Prof. Dro. Miguel Sancho Izquierdo, Prezidanto de “Frateco”, akompanis lin ĉe la prezida tablo: Fino. Inés Gastón, Prezidantino de H.T.E.S.; Sro. Ramón Laguna, organizinto de la Renkontiĝo en Huesca; Sro. Antonio Gamboa, Vicprezidanto de “Fido kaj Espero”; Sro. Pedro Benedicto, Sekretario de Esp.-Grupo de Bilbao; Sro. Víctor Ortiz, Vicprezidanto de “Frateco” kaj Sro. Jacques Decobert, Prezidanto de la Grupo Pau-Adour kaj organizanto de tiuj Renkontiĝoj en Francujo.

La prelegonton prezentis, per trafaj kaj elokventaj vortoj, Dro. Sancho Izquierdo, kiu, unue salutis esperantlingve al la jam alvenintaj gesamideanoj. Li daŭrigis hispane, klarigante kial la esperantistoj el ambaŭ Pireneaj flankoj okazigas ĉi-tiujn Renkontiĝojn, kaj li prezentis Sron. de Diego kiel elstaran tradukiston kaj kompetentan profesoron de Esperanto, dirante interalie: “Antaŭe la hispana literaturo en Esperanto, ne okupis la gravan lokon, kian okupas, por ekzemplo, la angla aŭ la germana, sed, nun, dank’ al la ege bona traduklaboro de Sro. de Diego gravajn verkojn de la hispana kaj sudamerika literaturo oni povas legi esperante kun la sama ritmo kaj stilo, kiujn posedas la originaloj”. Fine li menciis, ke Esperanto, post 80 jaroj da ekzisto, daŭre kaj konstante progresas. La ĉeestanta publiko, kiu plenigis la salonon, premiis lin per tondra aplaŭdado.

La prelego de Sro. Fernando de Diego pri “El Esperanto y su entorno” estis direktita al la neesperantistoj, do, por ni preskaŭ ĉio, kion li diris, estas jam sufiĉe konata; malgraŭ tio, la parolstilo de Sro. de Diego vekis ĉies atenton. En sia parolado, informinte pri la figuro de Zamenhof kaj ties mirinda kreaĵo, li kritikis la esperantistojn, kiuj per siaj ekstravagancoj ridindigas sin kaj la Esperantan aferon kaj kiel pruvon de sia aserto, li legis parton de artikolo verkita de Gerardo Diego, hispana akademiano, kie li rakontas sian unuan kontakton kun esperantistoj; sed, aldonis Sro. de Diego, tio, feliĉe, apartenas pliparte al la pasinteco. Li emfazis ankaŭ ke, malgraŭ la aserto de multaj esperantistoj, Esperanto ne estas facila, ĉar por ellerni ĝin, same kiel por ellerni alian fremdan lingvon, oni bezonas konstantan studadon. Sro. de Diego finis sian interesan prelegon rekomendante al la ĉeestantoj, ĉefe al la gejunuloj, la lernon de la internacia lingvo. Tondra aplaŭdado premiis la brilan paroladon de nia elstara samideano. Sekvis interesa kolokvio, kaj je la eliro estis disdonitaj ekzempleroj de la dokumento “Hechos fundamentales...”.

10an de Majo. — Sub la eksperta kaj kompetenta gvidado de Sro. Enrique Vallés, Sekretario de la Provinca Delegacio pri Informo kaj Turismo, ni vizitis la katedralon, kie inter alie, ni povis admiri la ĉefaltaron, mirindan verkon el alabastro de Damián Forment kaj ankaŭ kapelon dediĉitan al Krucumita Kristo, al kiu la Huesca-anoj havas grandan fervoron. De tie ni iris ĝis la Provinca Muzeo, kie ni vidis belajn pentraĵojn sur ligno de la XVª kaj XVIª jarcentoj. La Muzeo situas en la sama loko kie, en la pasinteco, loĝis la aragonaj reĝoj kaj en unu el ĝiaj ĉambroj okazis, en la regado de Ramiro la IIª la Monaĥo, la legenda, aŭ historia okazintaĵo konata kiel “La sonorilo de Huesca”.



Je la 1.^a posttagmeze ni estis kore akceptitaj en la Urbodomo. Lia Moŝto Dro. Antonio Lacleta, urbestro de Huesca, bonvenigis nin, per trafikaj vortoj montris sian ĝojon pro la okazigo en Huesca de la nunjara Renkontiĝo kaj deziris al ni agrablan restadon en la urbo. Dro. Lacleta finis dirante salutvortojn en nia lingvo.

Sro. Decobert, el Francujo, dankis esperante la bonvenigajn vortojn de Dro. Lacleta, kaj Sro. Bringas, tradukis hispanen kaj salutis kiel Prezidanto de la Esp.-Grupo de Bilbao. Tuj sekve, Fino. Inés Gastón donacis al la Urbestro interesan libron en Esperanto kaj diversajn informilojn pri la Internacia Lingvo. Dankante, Dro. Lacleta promesis sian helpon por la starigo en Huesca de Esperanto-Grupo kaj eĉ, li aldonis, mi mem lernos esperanton.

Vizitante la diversajn sekciojn de la Urbodomo ni iris al salono, kie troviĝas la fama pentraĵo de Casado del Alisal pri "La sonorilo de Huesca" kaj kie jam estis pretaj, kiel ĝentila kaj afabla invito de la magistrato de Huesca, manĝaĵoj kaj trinkaĵoj. Dum tiu agrabla momento ni informis amplekse pri Esperanto, kaj mi povas certigi, ke Huesca havos en baldaŭa estonto, vigan Esperanto-grupon.

Post la tagmanĝo en la Hotelo Pedro I.^a, ni enaŭtobusigis por viziti, bedaŭrinde sub intensa pluvo, la "colegiata-n" de Alquézar, kies belecon kaj arttrezorojn priskribis Fino. Inés Gastón en pasinta numero de BOLETIN. Ĉe la enirpordo ni vidis, surprize kaj dankeme, afiŝeton per kiu, en nia kara lingvo, ni estis bonvenigitaj. Akceptis kaj akompanis nin dum la vizito la Sekretario de la Magistrato de Alquézar, Sro. Francisco Fantova.

Nokte, ĉe tipa restoracio "Venta del Sotón" en tre amikeca kaj kamaradeca etoso ni ege bone manĝis. Je la fino la Ensemblo "Sta. Cecilia" montris al ni la gajon kaj viglon de la aragona "jota" tiel en la danco kiel en la kanto. La folkloro festo ege plaĉis al ĉiuj gesamideanoj.

11an de Majo.—Je la 9.^a matene ni ĉiuj kunvenis en la preĝejo "Sankta Petro la Oldulo" por ĉeesti la Sanktan Meson. Celebris kaj predikis, en la internacia lingvo Esperanto, Pastro Manuel Casanoves CMF. Por tiuj, kiuj jam aŭdis la belajn predikojn de Pastro Casanoves, ne necesas, ke ni diru ion; kaj por tiuj, kiuj ne povis aŭdi lin okaze de Kongresoj kaj Renkontiĝoj, mia konsilo estas tre simpla; klopodu aŭskulti lin, ĉar certe vi ĝuos, aŭdante la belsonecon de Esperanto en tre interesa predikado de Pastro Casanoves.

Poste, per aŭtobuso, aŭ per propra aŭtomobilo, ni ĉiuj iris ĝis la Kastelo de Loarre, la plej bela kastelo el romanika stilo ekzistanta en Hispanujo, kiun ni detale vizitis kaj kie —same kiel en Alqu zar— bonvenigis nin pere de aŝeto en Esperanto. De tie ni iris ĝis la gastejo “La Apro” situanta en bela natura zono, kie ni tagmanĝis.

Dum tiuj tagoj, Sro. Decobert kaj la Estraro de H.T.E.S., respondeculoj en Francujo kaj Hispanujo respektive, de tiuj internaciaj renkontiĝoj pritraktis diversajn aferojn, rilate al ĝia organizado, ĉefe pri la okazigo de venontjara Renkontiĝo.

Cio en la vivo havas du flankojn, unu bona kaj alia malbona, kaj por ni, gpartoprenantoj en la Renkontiĝo, venis la trista momento de la adiaŭo; sed la esperantistoj devas esti optimismaj, kaj, anstataŭ adiaŭi, ni prefere diris; “ĝis venontjare en Tarbes”.

Antaŭ ol fini mi volas esprimi je mia nomo kaj mi riskas diri je la nomo de ĉiuj, la plej grandan kaj koran dankon al F-ino In s Gast n pro ŝia laboro en la organizado de tiel sukcesa Renkontiĝo.

Venontjare la francaj gesamideanoj atentos nin en Tarbes. Pri la datoj kaj la programo vi estos, siatempe, informitaj pere de BOLETIN.

L. Hern ndez
Valladolid, Majo 1975.

INTERNACIA LIGO DE ESPERANTISTAJ INSTRUISTOJ - I. L. E. I.

Hispana Sekcio:

str. Queipo de Llano, 18

CALLOSA DE SEGURA (Alicante)

Al ĉiuj hispanaj membroj de I.L.E.I.

Al ĉiuj esperantistaj Instruistoj.

ENKONDUKO. — Evidentas la facileco, utileco kaj taŭgeco de Esperanto kiel internacia lingvo, jam de longe akceptita de ONU, UNESKO, kaj de gravaj sociaj, politikaj kaj religiaj organizoj. Praktike ĉiuj agnoskas ĝin la sola solvo por la internaciaj rilatoj kaj povas sperti kiel mirinde ĝi funkcias en internaciaj kongresoj, konferencoj, renkontiĝoj, k. c. Estas do ni, kiuj devas faciligi la ĝeneralan alprenon de Esperanto por ĝia disvastigo en la lernejoj medioj. Ni devas entrepreni la taskon fariĝi gvidantoj de kursoj, kion ni efektivigu ĉefe tra I.L.E.I. en komuna laboro kun la lokaj esperantistoj.

ESTAS NECESE, KE VI FARIGU MEMBRO DE I.L.E.I. se vi ankoraŭ ne aniĝis al ĝi. Ni estas nur 39, sed ni scias per fidindaj informoj, ke ekzistas pli ol 300 esperantistaj geinstruistoj. Simpla poŝtkarto faros la aferon.

LA KVINLANDA LERNEJA EKSPERIMENTO de Aŭstrujo, Bulgarujo, Hungarujo, Italujo kaj Jugoslavio por enkonduko de Esperanto en la lernejoj finiĝis per granda sukceso kaj I.L.E.I. preparas nun similan eksperimenton en aliaj kvin landoj: Belgujo, Britujo, Francujo, Nederlando kaj FR-Germanujo en la triaj kaj kvaraj klasoj de elementaj lernejoj kies modela eksperimento estas limigita je du jaroj. Estus interese en la lernojaroj 1975-76 starigi la saman eksperimenton en Hispanujo, Portugalujo, Maroko, Algerio kaj Tunizio. Tamen ni proponus kiel materialon por lernado milon da vorto-frazoj en 44 studhoroj de praktiko.

LA 35.^a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO EN LERIDA —18.^a ĝis 22.^a julio— donos al ni la okazon renkontiĝi kaj diskuti i.a. pri organizado, asociaj rilatoj, enkonduko de Esperanto en la lernejoj kaj modernaj metodoj (Kursoj Korespondaj, Esperanto Programita, Frazologia Metodo, k.t.p.).

LA INTERNACIA KONFERENCO DE I.L.E.I. 1975, kiel jam anoncita de nia prezidanto, Rektoro Sonnabend, okazos en Danlando de la 18.^a ĝis la 25.^a julio, ĉe popolalternejo Krogerup Hojskole en Humlebaek. Oni esperas nian ĉeeston por alporti pozitivan kontribuon por ĝia sukceso. Niaj informoj pri agado kaj instruado pri Esperanto estos alte estimataj.

LA INTERNACIA KONFERENCO DE I.L.E.I. 1976 EN ALICANTE estas por ni motivo de zorgo kaj fiero. De la 28.^a aprilo ĝis la 2.^a majo ĉijara, la estraro de I.L.E.I. kunsidis en Parizo kaj principe, oni decidis okazigi la Internacian Konferencon de I.L.E.I. dum 1976 en Alicante, mi esperas vian kunlaboron por ĝia sukceso.

Prof. Francisco Zaragoza
I.L.E.I.-sekiestro por Hispanujo

PREMIO KLARA SILBERNIK

En la kultura kadro de Hispana Esperanto-Muzeo, ĉirkaŭ 200 gesamideanoj, la 11-an de majo, kunvenis en San Pablo de Ordal por honori edzinon de esperantisto, kiu plej abnegacie helpis sian edzon en la batalado por Esperanto.

La premio konsistas en medalo montranta la buston de Klara Silbernik de Zamenhof, kiel memoron kaj dankemon al tiu brava virino, kiu tiom helpis sian edzon por la aperigo de nia kara lingvo.

El la programo, kiu okazis en "Centro Artístico de San Pablo" kaj en kiu rolis kiel prezentantino F-ino M.^a Jesús Molina Serrano, menciinda estas la prelego de F-ino Silvia Martínez García "Pubilla" de Sabadell kaj de la Provinco de Barcelono, kiu laŭ la temo "Esperanto kaj la virino" objektivite prezentis la kunlaboradon de s-ino Klara Silbernik al ties edzo, la rajtojn kaj diskriminacion de la virino, ĉiam rememorante, ke la nuna jaro estas la Jaro de la Virino.

Mirinda estis la kunlaborado de niaj etaj samideanoj, kiuj per skeĉoj, deklamado kaj kantoj entuziasmigis la ĉeestantaron.

Sendube la plej emocia momento estis tiu, kiam F-ino Faustina Martínez, instruistino en San Pablo de Ordal, anoncis ke la unuan medalon ricevos s-ino Antonia Galvany de Criach. Komplete kortuŝita nia batalema samideanino dankis, kiel ŝi diris, pro tiel granda honoro. La respondo de la ĉeestantaro ne prokrastiĝis, ĉar tuj, varmega aplaŭdado ne permesis aŭdi la lastan frazon de ŝia paroladeto. Samtempe larmoj de feliĉo glitis sur la vangojn de nia fervora kaj senlaca kamaradino.

Fine, dek belaj lernantinoj de San Pablo de Ordal, legis pli ol 40 salutojn, alvenintajn el eksterlando kaj el diversaj hispanaj E-grupoj, el kiuj salutoj estas por ni tre kara tiu de la Prezidanto de H.E.F. s-ro Angel Figuerola Auqué.

En la restoracio "Cavas Park", kie okazis la frateca kunmangado, oni prezentis honoran medalon al s-ino Teresa Massana de Hernández, edzino de la vera organizanto de la festo, nia amiko L. M.^a Hernández Izal.

Ekde la venonta jaro la premio estos nacia, kaj ĉiu hispana esperantisto rajtas proponi kandidatinton.

Luis Serrano Pérez



F-ino Faustina Martínez transdonas la medalon al S-ino Antonia Galvany de Criach.

NI GRATULAS

Unu plian fojon nia gratulo estas dediĉita al nia samideano S-ro Gabriel Mora i Arana, kiu gajnis la 1-an premion "Flor Natural" en la Floraj Ludoj, de Manresa (Barcelona) okazintaj la 25-an de majo ĉijara. Nia samideano kaj elstara poeto, la 24-an de majo, ankaŭ estis gajninta 1-an premion en Literatura Konkurso, Originala poezio, ĉifoje temis pri premio "López Picó".

Koran gratulon al S-ro Mora i Arana.

INTERNACIA ESPERANTISTA

GEEDZIĜO

La 7-an de majo, en la preĝejo de Sankta Mikaelo de Urbarri (Bilbao) amaso da personoj svarmis sur la strato, atendantaj la alvenon de juna geparo kiu volis unuiĝi en geedziĝa ceremonio, antaŭ la altaro.

Altrangaj personoj ili ne estis, sed tamen ili havis ion eksterordinaran, kio altiris la scivolemon de la publiko. Kelkajn tagojn antaŭdate jam la radio, lokaj ĵurnaloj, kaj la televido en regiona programo distrumpetis la novaĵon: "Du esperantistoj, li nederlando, ŝi bilbaoanino, geedziĝos. La pastro (ankaŭ esperantisto) celebros la meson en esperanto, kaj la tuta bilbaoa esperantistaro ĉeestos la ceremonion, por krei intiman atmosferon. La gefianĉoj interkompreniĝas esperante, kaj ankaŭ ĉi tiu lingvo estos ilia familia komunikilo. Ili konatiĝis en esperantista kongreso, kaj laboras en psikiatria kliniko, kiel flegisthelpantoj. Kiel kuriozaĵon oni devas aldoni ke en tiu kliniko geesperantistoj, apartenantaj al sep landoj, laboras kaj uzas kiel solan lingvon esperanton".

Jen la raportoj faritaj de la ĵurnaloj (kies redaktoroj ankaŭ ĉeestis la ceremonion, kaj denove raportis pri la evento) kaj jen la protagonistoj: **Ŝi**, M.^a José Morán, membro de la grupo de Bilbao, kaj iama sekretariino de HEJS. **Li**, Roelof Spoelder, nederlando de Grotingen. La celebranto, pastro Zulueta, S. J. de Loyola.

La meso glate disvolviĝis, kaj post la tradicia demando "ĉu vi intencas ami kaj respekti vin reciproke, dum via tuta vivo, en sankta geedza kuniĝo" duobla jeso, firme kaj klare, sonis.

Verdire, ni travivis okazintaĵon neĉiutagan. Ni deziras por la ĵus "bakitaj" geedzoj longedaŭran feliĉon kaj amoplenan kunvivadon.

JOZEFO

VATIKANA RADIO

La aprila bulteno de la Vatikana Radio publikigis leteron de esperantisto proponante radiajn elsendojn en la internacia lingvo.

Tiun aperigon oni konsideras signifoplena ĉar verŝajne per ĝi la Vatikana Radio volas sondi la terenon por ekscii ĉu estas konsilinde aldoni Esperanton al la longa listo de la ĝis nun uzataj lingvoj.

Do, se —kiel oni fidas— sufiĉe multaj esperantistoj tra la mondo reeĥos je tiu letero, subtenante la en ĝi faritan proponon, la dezirata ebleco povos konkretiĝi.

Se vi volas kunhelpi tiucele, skribu nacilingve al

RADIOVATICANA
Città del Vaticano

ESPERANTISTA RENKONTIĜO EN DENIA (Alicante)

Dimanĉon, la 11-an de Majo, en bela urbo Denia, okazis la ĉijara Renkontiĝo de esperantistoj el la provincoj Valencia kaj Alicante.

Nia rendevuejo estis la haveno. Je la 10,30 h., en granda amaso, ni piediris tra diversaj stratoj ĝis la Sparkaso (Caja de Ahorros del Sureste de España), kies malavaraj respondeculoj pretigis por nia kunveno grandan salomon.

Prezidis la kunsidon gesamideanoj de Valencia, Alicante, Callosa kaj Callosa de Segura. Malferminte la kunsidon, unuavice, fraŭlino el Valencia legis saluton de Dro. Herrero, kiu pro familiaj devoj ne povis ĉeesti. Sekvis la salutoj de la reprezentantoj de Valencia, Alicante, Callosa de Segura, Cheste, Burjasot, Campello kaj Catral. Samideanoj el Francujo kaj Belgujo ankaŭ sendis salutojn, sed specialan mencion meritas nia samideano José Pedro de Sousa Santos, el Matosinhos (Portugalujo), kiu nur por ĉeesti inter ni kaj saluti ĉirkaŭbrake karajn, fratajn geamikojn venis el najbara lando.

La okazigo de Internacia Konferenco de I.L.E.I. en Alicante, dum 1976 estis longe priiraktata. Tiucele, oni laboras de antaŭ kelkaj semajnoj. Ĉiuj akceptis la informon kun granda entuziasmo.

La distra parto de la programo, inter kiu elstaris la teatra skeĉeto "La ŝtelisto de ombro", vere allogis la ĉeestantaron.

Fininte la kunsidon, ni vizitis la Kastelon, de kies belvedero ni povis ĝui belegan marbordan panoramon. Kaj, tuj sekve ni arigis por komuna tagmanĝo ĉe Restoracio Noguera, kie ni restis en agrabla etoso ĝis la 6-a posttagmeze.

Kaj, alvenis la momento de la adiaŭo, sed kiel ĉiujare estis nur... Ĝis revido...!

José M.^a Bernabéu

C A T R A L (Alicante)

Post adekvata informado, esperantistoj de Callosa de Segura vizitis la urbeton CATRAL (Alicante). Akompanis ilin granda iluzio esperantigi la tieajn interesitojn pri la Internacia Lingvo.

S-ro Direktoro de la tiea Nacia Lernejo akceptis nin kaj tre volonte faciligis al ni la vojon irendan. La entuziasmo tiel forte tiklis inter la ĵusa gelernantaro ke ĉiuj naciaj geinstruistoj partoprenas la komencitan kurson, eĉ de apuda urbeto DOLORES, alvenas akurate paro da geinstruistoj.

Ĉusemajne, jaŭdon, de la 5-a ĝis la 6-a posttagmeze, la gelernantaro arigas en du salonoj; pro partopreno en la klaso de ankaŭ pluraj junaj gelernantoj, ne sufiĉas unu granda salono por ĉiuj.

Jam de antaŭ tri monatoj, sinsekvaj jaŭdoj, kun progresiva intereso, en esperantista medio, CATRAL-CALLOSA gesamideanoj vivas por kaj per Esperanto.

Cu persistados en konstanta fruktodono tiu ĉi semado? Ni semu kaj semu konstante.

José M.^a Bernabéu

ĈU NOVA ESPERANTO-GRUPO EN FUENGIROLA?

Jes, kaj kvankam, ankoraŭ ne oficiale, ĝi jam funkcias, dum la respondeculoj preparas la Statuton por leĝigi ĝin.

Dum mia vizito al la belega "Costa del Sol" mi haltis en Fuengirola (Málaga) por viziti mian bonan amikon; li ne estas esperantisto, sed, dum nia interparolado, kompreneble mi tuŝetis la temon, Esperanto; li parolis al mi pri bona esperantisto, amiko sia, Francisco López Ramírez, ni tuj vizitis lin. Nia samideano Francisco López kaj mi estis feliĉaj parolante en Esperanto, li rakontis al mi, ke li estas la sola esperantisto en Fuengirola; sed li havas kelkajn geamikojn, kiuj tre interesiĝas pri Esperanto. Tiam mi proponis fondi Esperanto-Grupon kaj tuj komenci kurson de Esperanto, ĉiuj akceptis mian ideon kaj la 23-an de februaro, je la 7-a vespere okazis la renkontiĝo, kiun partoprenis pluraj personoj entuziasme interesitaj pri la Internacia Lingvo; 15 el la ĉeestantoj loĝas en Fuengirola, la ceteraj venis de Sevilla, Badajoz, Benalmádena, kaj mi loĝanta en Valladolid.

Ĉiuj konsentis fondi la Grupon, praktike, ĝi jam estas fondita kaj mi esperas ke tiu floranta Grupo en baldaŭa estonto estu sufiĉe grava por organizi la okazigon de Hispana Kongreso de Esperanto en tiu bela parto de nia lando.

A. Gamboa

Carolina MINIO-PALUELLO MINNAJA
Viale Giulio Cesare, 223
I - 00192 ROMA

Roma, la 16an de aprilo 1975a
Al D-ro V. SADLER
kaj S-ro S. MILOJEVIC
Centra Oficejo de UEA
Nieuwe Binnenweg 176
ROTTERDAM - 3002 Nederlando

Estimataj Samideanoj,

Antaŭ ĉio mi dankas vin ambaŭ pro viaj leteroj respektive de la 28/2 kaj 23/3/1975, kaj mi petas pardonon pro la fakto, ke mi ne skribas al vi unuope (ĉar absolute mankas al mi la tempo).

Kiel mi timis —kaj tiun timon mi esprimis ĝuste en mia letero de la 24/2 al d-ro Tonkin kaj al s-ro Milojevic (kopie al d-ro Sadler)— la membroj de UEA tute ne havas la eblecon konigi siajn pensojn al la samideanaro, se tiuj ne kongruas kun tiuj de la Estraro de la Asocio aŭ de la Redaktoro de "Esperanto". Tion klare pravas la publikigo, en la marta numero de la revuo, de unu alineo mia el tiu letero.

D-ro Sadler skribis al mi, ke "ĉiu libero postulas ankaŭ ian disciplinon aŭ memdisciplinon. Ekz. devus esti eble kritiki publike ĉiun ajn personon, sed tio postulas ankaŭ eviton de insultoj, kalumnioj k.s.". Kaj poste, aludante al citado de nur kelkaj vortoj, li aldonas: "...Estus alia afero, se miaj citoj el publikigitaj artikoloj aŭ cirkuleroj aŭ el unuopaj leteroj donus aŭ celus doni malĝustan impreson pri ilia kompleta enhavo".

Cu ne ŝajnas al vi, ke ĝuste tion faris s-ro Milojevic publikigante tiun mian alineon? Mi rimarkigas, ke nek en tiu mia letero, nek en tiu al s-ro Ragnars-son (de kiu mi sendis kopion al la adresitoj de la alia) troviĝis insultoj al tiu ajn, sed nur malaprobo pro ofendaj esprimoj, aperintaj en la revuo, kontraŭ prof. Lapenna. Kaj, dum tiuj ofendoj ja aperis, tute ne aperis mia opinio koncerne ilin, kvankam ĝuste el tiu mia letero estis publikigita tiu alineo. Cu vere miaj vortoj koncerne la artikolon "La nekomprenemaj vidvinoj" estis la ĉefa enhavo de mia letero, aŭ ĉu ili ne estis nur malgranda aldono, komen- ciĝanta per "Cetere" (ne publikigita), kiu klare montris, ke ĝi estas akcesoraĵo?

Koncerne malafablajn vortojn en la revuo, jam la 14an de novembro mi skribis al s-ro Milojevic, ke mi "absolute malaprobas la malafablajn vortojn rilatantajn al la parolado de s-ro Ernle Money" (kiu troviĝas en la artikolo "Alidirekta leciono", aperinta en la oktobra numero de "Esperanto").

Mi tute ne petis publikigon de mia letero, sed la nuna aperigo de tiu ereto devigis min perdi tempon por mi tre valoran, kaj forjeti monon, por sendi kopion de tiu mia letero almenaŭ al kelkaj geamikoj, por ke ili ekkonu ĝian esencan enhavon (kaj al kelkaj mi devos sendi kopion ankaŭ de ĉi tiu).

Malgraŭ, ke ĉi-supre troviĝas kelkaj demandosignoj, tio tute ne signifas, ke mi volas perdigi al vi la tempon por respondi: temas simple pri retorikaj demandoj.

Kontraŭe pri unu afero mi ŝatus legi informon en la revuo: Kial UEA tute ne estis reprezentita en la Generala Konferenco de UNESKO, okazinta en Parizo? Cu la nuna Estraro taksas ne grava la kontakton kun UNESKO? Laŭ mi ĝi estas unu el la tre gravaj atingoj de prof. Lapenna.

Kun multaj koraj salutoj,

Carolina M-P. Minnaja

La ĉi-supran leteron mi ricevis kiam la pasinta numero de BOLETIN estis ĵus aperinta; tamen mi volonte aperigas ĝin nun por ke la legantoj de nia organo estu kiel eble plej bone informitaj. Plie ĉar Sinjorino Minnaja estas tre kara al pluraj hispanaj Esperantistoj.

Red.

TUTMONDA LIRIKO

DAVID OVADIJA

— bulgara poeto —

* * *

Edziĝofeste — en plej gaja hor',
la amuzado kiam ekabundos
kaj svarmos festparoloj el la kor',
kaj kiam la feliĉo vin inundos —
mi venos tre subite, sen invit'!
Tuj ĉies voĉ' kaj vort' kaj bru' formortos!
Nur eble gast' ebria — dum vizit' —
rigardovage ridos, sed ne vortos!
Alarme min rigardos via frat',
patrino via balbutante svenos:
"Li estas tiu... nia li konat'...
Sed kial li meznokte ĉe ni venis?"
De via kara edzo la mien'
ruĝiĝos pro kolero kaj ofendo —
kaj ĉesos ankaŭ viaj rid', seren'...
Mi venos simple vidi vin... legendo.

El la bulgara tradukis
Canko Murgin

TREVOR ZAHRA. Juna malta poeto. Ĉar li lernis Esperanton, li mem tradukis el la malta tiujn du poemetojn aperintajn en 1972, en la libro EDEN, kies aŭtoro li estas.

SUNO KAJ IDEALO

Ĝestas bela la printempo,
Ĝi vestigas la naturon
Kaj redonas al la kampo
La belecon,
La dolĉecon!
Sed tiu bona printempo
Ĝustus tempo fuŝa, fuŝa,
Se la suno ne brilegus,
Ne ridegus!
La printempo de la vivo
Ĝustas certe la ĵuneco,
Sed ĝi ĉstus fuŝa, fuŝa,
Se ne brilus,
Se ne ridus
L' idealo!

PENSOJ PRI OKTOBRO

Hirundoj flugas en la ĉielo griza
Aero stulta, sen suno, sen kolor'
Kelkaj krizantemoj tremas en ĝardeno
La pluvo harmonegas kiel ĥor'.
Kaŝtanoj dancas en la bonodoro
Varmega kafo kun fumeto blu'
Ventoj vundegaj ploras ĉe la pordo
Remuĝas tondroj ĝenaj du po du.
Ĉambro soleca kun malplena lito
Kandelo vana kun la teda fumo
Dormegas la horloĝo sur la ŝranko
Pensas poeto kun la seka plumo.

Malta, 14.3.1975.

JULIO ALARCON. Naskiĝis en Córdoba, en 1843 kaj mortis en Madrido en 1924. En sia junaĝo li verkis du poem-librojn, kiujn la recenzistoj tre laŭdis. Fariĝis jezuito kaj direktis la revuon "Mensajero del Corazón de Jesús". Verkis biografiojn pri la violinisto Monasterio, pri la aŭtorino kaj politikistino Concepción Arenal kaj la poem-kolekton "Recuerdo de recuerdos".

KAJ MI ESTOS MORTA!

Sonas sonoriloj per funebra sono
en sonorilejo, per tutmorna tono.
Eble baldaŭ sonos per koncert' akorda,
kaj mi estos morta!

Kiam pro mi sonos, eble en tag' bela,
klara kaj sunluma kaj ĉiele hela,
iros ĝardenisto al ĝardeno korta,
kaj mi estos morta!

Iros vojiranto tra la pinarbaroj,
tra la longaj vojoj, tra la longaj padoj,
ekvidos maristo havenon marbordan,
kaj mi estos morta!

Svarmados la homoj tra stratoj kaj pontoj,
flirtados la birdoj tra valoj kaj montoj,
ŝaŭmos rivereto per kantad' agorda,
kaj mi estos morta!

Iros al milito, iros armeanoj,
trairos dezertojn longaj karavanoj
kaj la misiistoj por prediko vorta.
Kaj mi estos morta!

Kiam ili sonos eble en tag' bela,
klara kaj sunluma kaj ĉiele hela
se ĉiele trovas mi l' eniron pordan
mi ne estos morta!

Tradukis
Analia Núñez Dubis

ĈU VIRINO AŬ VIRO?

Siatempe en "Esperanto" aperis artikolo pri Marjorie Boulton. Feliĉe mi konas ŝin persone kaj tial scias, ke temas pri la virino. (La aldonita fotografajo nenion ja pravas, ĉar ankaŭ viroj havas nun longajn harojn.) En la artikolo kun miro mi konstatis, ke Marjorie Boulton estis ESTRO de instruista kolegio, debutis kiel esperanta VERKISTO, funkciis kiel SEKRETARIO de la Komisiono de UEA, oficis kiel PREZIDANTO de la Societo de Britaj Esperanto-Instruistoj. Aŭ eble ŝi ŝanĝis la sekson?...

La cititaj frazoj estas same dubesencaj kaj evitindaj, kiel "li edziĝis kun esperantisto"!

Fine oni ĉesu altrudi al la esperantistaro nerekomendindajn anglajn lingvo-kutimojn kaj malpurigi Esperanton, la lingvon vere internacian!

mag. I. Dratwer, Israelo

Deŭove nia hungara samideano, Dro. Vilmos Benczik aperas en la paĝoj de BOLETIN kiel premiito; li estas aŭtoro de la rakonto "Stranga historio pri heredita pentraĵo" per kiu li gajnis la unuan premion "Fundación ESPE-RANTO".

STRANGA HISTORIO PRI HEREDITA PENTRAĴO

Lorenzo Lam estis konata en la oficejo, kaj ankaŭ en la domo, kie li luis ne tro grandan, tamen por li sufiĉe komfortan loĝejon, kiel modesta, ordema kaj akurata homo. Kaj neniun el la epitetoj li ricevis senkaŭze, ĉi tie, en la Malnova Kvartalo la homo estas pli severaj ol aliloke: koncerne lian modestecon sufiĉas mencii, ke tre malofte iu konato sukcesis anticipi lin en la reciproka salutado, pri la ordemo atestis lia eksmoda, tamen aŭtoritata eleganteco kaj la ĉiam senriproĉe rekta dislimo, kiu trakuris la mezon de lia maldensiganta hararo, nu, kaj kio koncernas la akuratecon, sufiĉas noti nur unu fakton: la tuta domo ĝustigis sian horloĝon laŭ la foriro kaj reveno de Lorenzo Lam.

La akurateco estis elsanga proprajo de Lorenzo Lam. Oni povus ĝustigi la horloĝon ne sole laŭ lia foriro matene kaj reveno dum la malfrua posttagmezo, sed same laŭ la momento, kiam li malfermis la kranon en la banĉambro, aŭ kiam je la dekunua horo li malsaltis la lampon en sia ĉambro. Tiu precizemo certigis al li ekvilibrite trankvilan vivon, kaj efektive tio estis lia celo. Kiel malbona kaj foraverta ekzemplo ŝvebis antaŭ li la ekzemplo de lia pli maljuna frato, Alberto, kiu pro sia malordema vivo konstante luktis kun aro da problemoj, eĉ financaj. Jes, financaj, kvankam Alberto Lam kiel renoma komponisto de kanzonoj gajnis almenaŭ trioble pli, ol estis lia salajro de sekciestro en la matrikula oficejo, sed la ĉiuvespera diboĉado kaj la flirtsangaj virinetoj englutis ĉion, kaj ofte Alberto Lam restis sen groŝo. Tio al li, Lorenzo Lam, neniam povis okazi, la racie planita kaj senkompromise plenumita vivregimo eĉ ebligis al li spari konsiderindan sumon por neantaŭvideblaj ekstraj bezonoj. Liaj tagoj fluis monotone, sed ne tede por li, precipe depost la morto de la edzino antaŭ tri jaroj, kiun li sincere funebriis, ja la foririntino, kiel li ofte pensis, estis edzino inda al Lorenzo Lam: mankis al ŝi ĉia kapricemo, malordemo, kiu ĝenerale karakterizas la virinan genton.

Konforme al sia neniam ŝanĝita kutimo Lorenzo Lam sidis en sia fotelo kaj legis la semajnan detektivromanon ankaŭ dum la sabata posttagmezo, kiu komplete renversis lian vivon. La legado de detektivromanoj efikis al li trankvilige kaj ankaŭ kun ioma ekscito, sed tiu ekscito post la sestaga, sufiĉe senvaria laboro en la oficejo signifis fakte ripozon. Do, li sidis en la fotelo, kaj ĉizis siajn racion kaj inteligenton, kiuj ebligis al li vivi tiel perfektan vivon, kiam oni sonorigis ĉe la pordo. La sonorigo komplete konfuzis lin, ja en tiu tempo ĝis nun neniam iu ĝenis lin. Per hezitaĵ paŝoj li iris al la pordo, malfermis ĝin, kaj staris antaŭ li viro mezaĝa, kiel li mem, en malhela surtuto.

—Sinjoro Lorenzo Lam?

—Jes —li respondis maleme, kaj proponis al la nekonato eniri.

Klarigis, ke li estis la advokato de Alberto Lam, kaj venis kun la informo, ke Alberto mortis antaŭ kvar tagoj, sed antaŭ la morto li severe malfermis informi la fraton antaŭ la entombigo. La entombigo ĵus finiĝis, kaj la advokato venis informi lin kaj kondolenci, kaj ankaŭ anonci, ke Alberto Lam testamentis al li unu pentraĵon, kiun ankoraŭ hodiaŭ oni transportos tien ĉi, ĉar la posedanto de la loĝejo postulas, ke oni ankoraŭ hodiaŭ transdonu al li la ŝlosilon. La ceterajn aĵojn jam forportis la koncernuloj, ĉu heredintoj, ĉu kreditoroj. La advokato adiaŭtis kaj Lorenzo Lam konsternite, nekomprene gapis post li.

Lian konsternigon ne kaŭzis la morto de Alberto Lam, ja estis atendebla, ke la senorda, senracia vivmaniero plimalpli frue dismuelos lian organismon. Plie konsternis lin la impertinenteco, ke la apero de la advokato disblovis lian sabat-posttagmezan trankvilon, por ne paroli pri la alportata pentraĵo, kiu komplete embarasis lin. Lorenzo Lam sciis, ke la frato havis plurajn amikojn inter pentristoj renomaj kaj sentalentaj egale, do la bildo same povas estis kaj valorajo, kaj farbmakulita tolo. Sed fakte lin incitis ne la atendebla valoro de la bildo, prefere la fakto

mem, ke la frato testamentis ion al li, ja pasis almenaŭ kvin jaroj, ke ili lastfoje vidis unu la alian. Kaj cetere, kion li faru per la bildo? Ĉu pendigi en la ĉambro kaj distaŭzi la longe kutimitan varme harmonian atmosferon? Ĉu meti anoncon en ĵurnalo kaj vendi ĝin? Ĉu tiel, ĉu aliel, li antaŭsentis, ke tiu heredaĵo almenaŭ por certa tempo nepre porblovos lian trankvilon.

Kaj por kreskigi lian ĉagrenon, la pentraĵo eĉ estis sufiĉe granda, ĝi ampleksis almenaŭ tri kvadratajn metrojn. Kiam la dungitoj de la transporta firmao foriris, Lorenzo Lam kun enuaj movoj komencis ŝiradi la pakpaparon, kaj dume vidis, ke la detektivromano, kiun li metis malfermita sur la fotelon, malrapide, sed nehaltigeble fermiĝas. Kompreneble, li bone memoris la numeron de la paĝo, kie li ĉesis legi, tamen, en tiu natura fenomeno ŝajnis al li manifestigi decido de iu supernatura forto. Tio forprenis de li eĉ la restintan serenon. Fininte la malpakadon lia konsterniĝo nur pliiĝis. La pentraĵo montris scenon ŝokan, harstarigan kaj ne malmulte maldecan. Tri personoj kartludis ĉirkaŭ ronda tavolo: du virinoj kaj unu viro. Unu el la virinoj estis komplete nuda, la alia surhavis nur kalsoneton kaj kombineon, sed ĉi lasta estis ĉifita malsupren: videble ŝi ĵus deprenis la mamzonon kaj ankoraŭ ne reĝustigis la kombineon. La viro ankaŭ estis nekomplete vestita: li malhavis jakon kaj kravatton, kaj la manikoj de lia ĉemizo estis refalditaj.

Lorenzo Lam nun jam komprenis la intencon de la frato. Li volis fari senspitan ŝerson eĉ post sia morto, bone sciante, ke tiu heredaĵo kaŭzos al Lorenzo Lam ne malmultajn sendormajn noktojn. Ja kion fari kun la bildo? Pendigi ĝin estus absurde, tiu ĉi loĝejo ne povas toleri la ĉeeston de samspeca maldecaĵo, sed ankaŭ liberiĝi de ĝi ne estas facile. Kiu ja aĉetas tiaĵojn? Kaj eĉ senpage, al kiu donaci ĝin? Lorenzo Lam estis konata en la domo, kiel homo serioza, deca, kion oni pensos, se li komencos reklami sian pentraĵon? Ja vane li diros, ke li heredis ĝin, por la plimulto de la homoj tio signifos nenion, oni memoros nur, ke la respektinda Lorenzo Lam foje provis vendi aŭ fordonaci pentraĵon, kiu montras maldecan scenon.

La zorgoj tute malesperigis lin, kaj estis jam preskaŭ noktmezo, kiam li rekonsciigis al sia konfuziteco kaj iris al la banĉambro. La nerimarkita mal-

trafo de la longe kutimita tempo por enlitiĝo eĉ pliiĝis lian embarason. En la lito ankoraŭ longe li kuŝis maldorme, kaj lia rigardo ĉiam pli ofte haltis kun laca deprimateco sur la bildo, kiu kvazaŭ fosforeskis en la mallumo, almenaŭ la blindige blanka femuro kaj ŝvelaj mamoj de la komplete nuda virino.

Fine li sukcesis endormiĝi, sed la dormo ne donis al li trankvilon. Apenaŭ li transpaŝis la sojlon de la senkonscio, kaj atendis la unuan kareson de la dolĉa nenio, kiam la pentraĵo abrupte viviĝis. La alia virino — nigra, kun migdalformaj, sed grandaj okuloj — provis reĝustigi sian kombineon, sed ŝi ne sukcesis trovi la brakruon, kaj lasis la aferon. La alia virino trinkis iom el la glaso, kiu staris antaŭ ŝi, kaj levante la kapon por repreni la kartojn desur la tavolo, ŝi rimarkis lin. Je la sincera miro de Lorenzo Lam ŝi ne ekkriis, tute ne konsterniĝis, nek kovris la bruston kaj la sinon per la manoj, eĉ kontraŭe, ŝi starigis kaj kun provoka rideto ekiris al lia lito. Lorenzo Lam time tiriĝis al la muro, kaj volis fermi la okulojn, tiom pli, ke la senpudora korpo de la virino disradiis en la ĉambro helbluan, vibrantan lumon, sed liaj palpebroj ne obeis. Kun larĝe malfermitaj okuloj li gapis la lumantan fenomenon. En la nervostreĉa, blindiga fosforeskado prezentis trankvilon nur tri punktoj: unu pli granda sube, kaj du malgrandaj supre. Pasis almenaŭ kelkaj sekundoj, eble eĉ minutoj, ĝis Lorenzo Lam konsciigis, ke la granda makulo estas la seksoharoj, kaj la du malgrandaj la butonoj de la mamoj.

La virino estis jam tute proksime, kaj Lorenzo Lam sentis mortotimon. Li volis krii, sed ia stranga varmo mutigis lin kaj perdis la konscion. La trostreĉitaj ĉeloj de lia korpo esperis, ke nun venos la vere sensonga, griza, ripoziga dormo, sed pasis nur momento, kaj reaperis antaŭ liaj okuloj la ondantaj mamoj kun la du atracite nigraj, ne jam malhelruĝaj punktoj, kaj ankaŭ la tria, kiu daŭre promesis enlulon, dolĉan neniigon meze de la helblua vibrado de la femuroj kaj la ventro, sed ĉio ĉi jam ne vidiĝis tiel klare, kiel antaŭe, sed kvazaŭ tra nebulo aŭ maldika vualo.

La nokto pasis sen momenta vera ripozo, la virinoj alterne proksimiĝis al li, sed neniam ili atingis lin. Kiam la unua ruĝa radio de la leviganta suno penetris en la cambron, Lorenzo Lam

tuj ellitigis, kvankam li estis pli laca, ol vespere. La bildo staris senŝange sur la loko, kien la transportistoj metis ĝin, kaj ankaŭ la vibrado malaperis komplete.

Lorenzo Lam enpensigis. Estis por li klare, ke la noktaj eventoj nur estis songo kaj halucinaĵoj, kaj la tutan koŝmaron kaŭzis la serio de ŝokoj, kiun malfermis la apero de la advokato.

Tiu rekono iom fortigis lin, kaj li sukcesis pasigi la dimanĉon, kiel kutime, promenante, kun tagmanĝo en bonkvalita restoracio. La problemoj revivigis nur vespere, en la lito, kiam la bildo ŝajnis denove fosforeski, kaj vane Lorenzo Lam kovris ĝin per lit-tukoj, la malvarma lumo de la virinaj korpoj trapenetris ĉion.

La nokto pasis, kiel la antaŭa, kaj Lorenzo Lam ekiris lundon matene al la oficejo kun la firma decido, ke tiun ĉi tagon li dediĉos al la celo iamaniere liberigi de la malbenita bildo.

Lorenzo Lam, kiel decas al konservativa ĝentilhomino, la donitan promeson ĉiam konsideris sanktaĵo, eĉ, se li faris la promeson al si mem. "Kiu trovas pretekstojn antaŭ si mem, tiu baldaŭ ĉasos tiajn por klarigi neplenumon de promeso, farita al alia homo." Tamen, spite siajn firmajn principojn posttagmeze li ĉasadis jam tiajn pretekstojn, ĉar li eĉ ne proponis al iu ajn la bildon. Plurfoje li kolektis la fortojn, sed ĉiam katenis lian langon iaspeca miksaĵo de honto, nekonveneco kaj tute stranga, nekomprenebla maltrankvilo. La bildo restis, kaj la lunda, eĉ marda nokto pasis kun la skuaj, animkirlaj songoj.

Dum la songoj li vidis la bildon en mil variaĵoj, kaj tial merkredon matene li decidis bone rigardi ĝin posttagmeze, post la laboro, kaj fiksi ĉiujn detalojn en la memoro. Li atendis, ke la precizeco forblovos la misteron, kiu ŝvebas super la bildo, kaj tiamaniere ĝi ne povos plu ĝeni lin dum la noktoj.

Reveninte el la oficejo li surprenis sian hejman mantelon kaj sidigis antaŭ la bildo. Li devis agnoski, ke ĝi estis kreaĵo de homo, kiu bone konis sian arton. En la tri vizaĝoj esprimigis kvazaŭ tri diferencaj mondoj: tiu de la nuda virino radiis mildan serenon, naivan ĉarmon, preskaŭ senkulpecon, la alia rigardis kun okulumo koketa, provoka, sed ne tiel triviale, kiel la samspecaj virinoj, kiujn li kutimas vidi ĉirkaŭ la Urba Monumento. Kaj la plej karakterizan bildon ofertis la vizaĝo de la viro: li estis ĉirkaŭ kvindekjara, kun trajtoj parolantaj pri laco, rompiteco, sed en liaj kavaj oku-

loj tamen oni povis rekoni certan fajreron vivan, kiu ne lasis dubon, ke li ankoraŭ havas la plenan kapablon ĝoji kaj ĝui la vivon. Lorenzo Lam kun volita objektiveco pensis, ke lia frato verŝajne similis tiun viron, sed poste lia rigardo reglitis al la virinoj. Por vidi ilin pli bone, post kvaronhora penado li sukcesis pendigi la bildon sur la najlo, kiu dum la vivo de la edzino tenis sanktan ikonon, sed kiun li, ne estante religiema homo, donacis al la bofratino. Li devis konstati, ke ambaŭ virinoj estis tre belaj, kvankam tre diferencaj. La tute nuda kun longaj blondaj haroj reprezentis —nun li jam kuraĝis konfesi al si mem— la senkulpecon. Sed tiu senkulpeco ne radiis sole el ŝiaj okuloj kaj vizaĝo, sed el ŝia tuta mildkontura korpo. Lorenzo Lam, kiu vidis nudajn virinojn nur en sia knabaĝo sur pornografiaj fotoj, kaj en la realeco nur sian edzinon, sciis apreci la belajn formojn de ŝia korpo. Kaj la alia, kies haroj estis nigraj kaj tonditaj mallongaj, ankaŭ havis sian allogforton. Ŝi ŝajnis iom pli juna, eble eĉ ne dudekjara, ŝiaj mamoj ne estis tiom evoluintaj, sed rekompence fiksfirmaj kaj malmolaj. Post la zorga rigardado la senvestaj virinoj ĉesis esti ŝokaj por li, sed la tuto de la bildo tamen restis iel malnatura, mistera. Lia plano forblovi la misteron do sukcesis nur duone. La songoj daŭris, tamen, ili ĉesis esti ŝokaj, timigaj, jam kaŭzis nur iometan maltrankvilon, ekscititecon, eĉ ne malagrablan. La tagoj fluis, kiel antaŭe, kun la escepto, ke Lorenzo Lam ĉiun sian liberan tempon dediĉis al la bildo.

Li jam tute ne provis vendi aŭ fordonaci ĝin. Li vivis sian vivon sola, pli ĝuste en stranga duopo kun la bildo, kaj maldungis eĉ la purigistinon, kiu antaŭe ĉiusemajne venis ordigi iom la loĝejon, por ke neniu lin ĝenu dum la intimaj horoj kun la pentraĵo. Lorenzo Lam volis ĉiel ajn deĉifri la enigmon de la bildo, trovi la ŝlosilon de la mistero.

Jam pasis du monatoj de post la ricevo de la pentraĵo, kiam vekigis en li hereza penso: li devus rekonstrui la scenon en la realeco, kaj tio certe multe helpus al li penetri en la misteron. Unue li forĵetis la ideon, kiel absurdan, nenormalan, sed baldaŭ li jam pretekstis la praktikan nerealigeblecon de la plano. Kaj tiam li ekmemoris pri la stravirinoj ĉirkaŭ la Urba Monumento. Vere, ke neniu el la ĝis nun viditaj povus konkurenci kun la beleco de tiuj sur la bildo, sed tio, pensis Lorenzo Lam, ne tuŝas la esen-

con de la afero. Post tiu ĉi decido signifan parton de sia libera tempo li pasigis promenante ĉirkaŭ la Urba Monumento. Li spektis la virinojn kaj serĉis inter ili tiajn, kiuj plejeble similis tiujn sur la bildo. En la oficejo, eĉ en la domo oni jam parolis pri la strangaj promenadoj de Lorenzo Lam, sed la eksperimento tiel absorbis lin, ke li eĉ ne aŭdis la klačojn. Fine li sukcesis trovi du virinojn, kiuj, se ne ideale, tamen taŭgis por la celo. Li ankaŭ aĉetis libron kun kartlud-reguloj, kaj ellernis preskaŭ ĉiujn. Dum longaj semajnoj atendadis, por trovi ambaŭ elektitajn virinojn sur la placo ĉirkaŭ la Monumento samtempe, sed iun vendredan posttagmezon li decidis ne plu atendi, kaj alparolis la nigraharon, kiu tiam troviĝis tie. Laŭ la priskribo de Lorenzo Lam evidentigis, ke ŝi bone konas la alian virinon, kaj baldaŭ ili interkonsentis, kvankam li ne eksplikis precize, pri kio temas, nur aludis pri speciala servo, por kiu li kompreneble pretas pagi laŭmerite. La virino promesis avizi sian koleginon kaj Lorenzo Lam donis al ŝi sian adreson.

La renkontiĝo estis preparolita por sabatvespero. Sabaton posttagmeze Lorenzo Lam aĉetis ĉion necesan, glasojn, trinkaĵojn, cindrujojn plejeble similajn al tiuj sur la bildo. Reveninte hejmen li ĉion preparis, kaj kiel ajn tio ĝenis lin, li ne surprisis sian hejman mantelon, eĉ, refaldis la manikojn de sia ĉemizo, kiel estis videbla sur la bildo.

Precize laŭ la interkonsento, je la sesa horo oni sonorigis. Alvenis la du virinoj. Lorenzo Lam iom embarasite rakontis al ili, kian servon precize li deziras. La virinoj ŝajnis ne multe miri, ili rigardis la bildon, fiksis la prezon, kiun Lorenzo Lam kapjese akceptis, kaj rutinmove komencis senvestiĝi. Dum tiu sceno Lorenzo Lam sentis strangan premon en la gorgo, sed la kuriozeco de la situacio bone klarigis tion, ja dum sia vivo nenian li ankoraŭ vidis ion tian. Kiam ili finis, kaj sidiĝis al la tablo, Lorenzo Lam ĝoje konstatis, ke la nigrolino kvankam li ne avertis ŝin — surhavas ĝuste tian bluan kombineon, kiel la virino sur la bildo.

Ili interkonsentis ludi pokeron. Antaŭ ol komenci, la virinoj menciis, ke ili povos resti maksimume ĝis la naŭa. Lorenzo Lam konsente kapjesis.

Lia embarasiteco malpliigis nur iom post iom, kaj eĉ ne malaperis tute. Pro manko de praktiko en la ludo li ĉiam perdis, sed tio ne ĝenis lin, li nur pen-

sis pri tio, ke jen, la bildo nun vere vivigis, kaj li povas sondi ĝian sekreton elinterne. Stelrigarde li komparadis la du vivajn virinojn kun tiuj sur la bildo. La simileco ne estis malgranda, tamen, el la gastinoj mankis ĝuste tiu fosforeska vibrado kaj malpezeco, kiuj estis la plej karakterizaj trajtoj de la du pentritaj virinoj. Ankaŭ iliaj konturoj montriĝis iom malpli ravaj, malpli allogaj, tamen, ilia ĉeesto ŝajnis efiki. Lia agrabla maltrankvilo, ekscititeco fortiĝis, kaj tio estis bona antaŭsigno, ja la virinoj kreskigis en li ĝuste tiun senton, kiun origine elvokis la bildo. Je la naŭa la du virinoj vestis sin, ricevis sian monon, kaj promesis reveni la venontan sabaton.

La sabatvesperoj ripetigis ankoraŭ multfoje. Lorenzo Lam ne trovis la ŝlosilon de la mistero, sed li sentis esti ĉiam pli proksima al ĝi. La virinoj bone amuziĝis, ja plaĉis al ili la facila monakiro. Foje la blondulino pro vanteo jam ne eltenante la pasivon de Lorenzo Lam, provis persvadi lin al pli konkretaj agoj, sed li rifuzis la proponon, kies akcepto ŝajnis al li sakrilegio. Ankaŭ la proponon de la nigra virino li malakceptis, nome, komenci la kartludadon vestitaj, kaj post ĉiu partio devigi al la malvenkinto demeti unu vestepecon, vane tiu klarigis, ke certe ankaŭ la bildo eternigas momenton de tia partio. Sur la bildo tio ne videblas, li fermis nervoze la diskuton kaj la du virinoj eksilentis.

Dank' al la ŝparita konsiderinda sumo la sabatvesperaj kartludpartioj ne skuis lian financon ekvilibron, tamen lia havaĵo jam estis degelanta. Sed li ankoraŭ havis ne malgrandan sumon sur sia konto, kiam alvenis skribaĵo, kiu pli ol io ajn skuis lian ekvilibron, se ne la financon, do la animan. La letero venis de la advokato de la mortinta frato, kaj anoncis, ke laŭ ĵusa malkovro la bildo ne estis laŭrajta posedajo de lia frato, li aĉetis ĝin de ŝtelisto, do li, Lorenzo Lam devas ĝin redoni antaŭ ol la polico komencos molesti lin. Lorenzo Lam tuj vokis telefonon la advokaton, poste la policon kaj eĉ la laŭrajtan posedanton de la bildo, pruvis, argumentis, proponis aĉeti ĝin, sed vane, ĉiuj obstine kontraŭstaris lian klopodadon, kaj post kelkaj la bildo kun policista asisto estis forportita. Lorenzo tute malesperigis.

Sabaton vespere denove aperis la virinoj, kaj Lorenzo Lam rakontis al ili la eventojn. Tiuj provis konsoli lin,

ŝerce aludante, ke ili mem tamen estas tie, kaj virinoj vivaj ĉiam estas utiligeblaj pli celkonvene, ol pentritaj, sed Lorenzo Lam estis nekonsolebla. Jam post unu horo li pagis al la virinoj, kaj forsendis ilin dirante, ke ili ne venu plu, kaj tuj post ilia foriro ankaŭ li iris al la strato kaj aĉetis la detektivromanojn de la lastaj ok semajnoj. Reveninte al sia loĝejo li serĉis la hejman mantelon, kiun dum la lasta tempo sabate neniam uzis, kaj sternis sin en la fotelon por legi. Sed jam post dek minutoj li ĵetis la libron kaj fiksas sian rigardon al la muro, kie antaŭe pendis la bildo. Li streĉis la memoron por resorĉi ĉiun detalon, kaj la fantazon vidi ilin sur la muro, sed kun malmulta sukceso.

Lundon Lorenzo Lam ne aperis en la oficejo. Posttagmeze oni telefonis al lia loĝejo, sed neniu respondis. Mardon matene la direktoro sendis oficiston por sondi, kio okazis al li, sed tiu vane sonorigis, neniu malfermis la pordon. Oni anoncis la aferon al la polico, kiu malfermis la pordon, sed la loĝejo estis malplena. Ĉiuj loĝantoj, kaj an-

kaŭ la domservisto estis pridemanditaj, sed neniu vidis lin foriri. Lorenzo Lam malaperis sen postsignoj. La novaĵo elvokis grandan ekscitecon en la oficejo, sed post kelkaj semajnoj jam apenaŭ iu eldiris lian nomon. Nur la klaĉulinoj de la Malnova Kvartalo parolas foje-foje eĉ nuntempe pri la freneziginta oficisto, kiu ŝtelis maldecajn pentraĵojn kaj ĉiusabate kunportis al sia loĝejo dek publikulinojn samtempe, sed oni ne multe kredas tiujn klaĉojn. La mistero de la malapero de Lorenzo Lam restis nekonata por la postepoko, kiel li mem siatempe ne sukcesis malkovri la misteron de la bildo. Kaj kio okazis al la bildo mem? Nu, ĝian vojon ne kondukis feliĉo, ĉar la provinca vilao de la laŭrajta posedanto baldaŭ post la malapero de Lorenzo Lam komplete cindriĝis. Kompreneble ankaŭ tiun akcidenton sekvis diversaj nekredeblaj klaĉoj, tamen estas notinde, ke el la stranga pentraĵo eĉ peceto ne postrestis.

“CIRMI”

ALEKSANDRO MURATOV BULGARA HISPANISTO

La 15-an de junio aĝis sesdek jarojn la prestiĝa bulgara hispanisto Aleksandro Muratov, kaj kvankam lia nomo estas malmulte konata en la lando al kiu li dediĉis bonan parton el siaj laboroj plaĉas al ni la ideo rememori en ĉi tiuj paĝoj tiel fervoran amikon de la hispana literaturo.

Muratov naskiĝis en Pleven en la suda bordo de la rivero Danubo, studis Romanikan Filologion en Sofio kaj en Parizo kaj, estante tre juna, komencis kunlabori en literaturaj gazetoj. De la 1948a jaro en kiu aperas lia unua traduko, li ne ĉesis intensigi sian scion de la kastilia lingvo kaj publikigi verkaĵojn rilate al nia literaturo. Lia plej freŝa verko estas antologio tre kompleta de kvar dek poetoj de la XXa jarcento, ekde Johano Ramono Jiméñez ĝis Kaŭdo Rodríguez (Sevremenna Ispanka Poesia = Poesía Española Contemporánea) (1962) kaj “Elektitaj Verkoj”, de la sama aŭtoro (1973) realigitaj en kunlaboro kun alia granda poeto bulgara, Atanas Dalchev. En ĉi tiu lasta traduko intervenis la filo de Muratov, ankaŭ hispanisto, kiu prenis sur sin la tradukon de la teatro kaj la prozo de Lorca kaj de bonega eseo-antaŭparolo.

Aleksandro Muratov estas eminenta poeto, kiu aperigis plurajn verkojn: “Danuba Printempo”, “Estanta Tempo”, “La Savita Lumo”, “Malgranda Kvartalo”, ktp. Kaj pluraj volumoj de poemoj por Infanoj, ĝenro, kiun kulturata multe la plej bonaj bulgaraj verkistoj. De lia lasta libro “En ĉi tiu Mondo” (Na Toia Sviat) (1973) ni elektis kaj tradukis poemon, el kiu transcendas la senkuraĝigon kaŭzitan de la malsano de la okuloj, kiun suferas la aŭtoro, lige kun la ne malpli amara pripenso pri la sinofero kaj anonima laboro de la tradukinto. — JUAN E. ZUÑIGA.

(El la semajna gazeto “INFORMACIONES DE LAS ARTES Y LAS LETRAS”. Esperantigis INSTRUISTO.)

LA GRUPO FIDO KAJ ESPERO DE VALLADOLID AKTIVAS

Kiel anoncite, la 18-an de Marto, en la sidejo de la Grupo, komencis ciklo da paroladoj pri diversaj temoj, organizita de la estraro kun la celo plivigligi la vivon de la Grupo kaj samtempe kuraĝigi al ĝiaj membroj en la uzo de la Internacia Lingvo.

Unua preleganto estis nia entuziasma samideano, S-ro Luis Hernández, kiu parolis pri U.E.A. Li legis kelkajn artikolojn de la Statuto de U.E.A., kie klare estas fiksita la neŭtraleco, kiu devas regi la Asocion. Poste li klarigis la metodon por elekti komitatanojn kaj reliefigis la eventojn okazintajn dum la lasta Universala Kongreso, jam sufiĉe konatajn de la tuta samideanaro. Sekvis interesa kolokvo kaj ĉiuj ĉeestantoj konsentis ke neŭtraleco estas nepra kondiĉo por ke U.E.A. povu reprezenti la tutmondan esperantistaron.

La 15-an de Aprilo, S-ino M. R. Uruña, sekretariino de nia Grupo, kaj profesorino pri Internacia Juro en nia Universitato, parolis pri "La Internacia Virina Jaro", laŭ la Internacia Juro kaj la aktualaj leĝoj en nia lando. La aktualeco de la temo vekis grandan intereson inter niaj samideanoj, kiuj atente sekvis la bone dokumentitan prelegon, de nia samideanino, kiu je la fino devis respondi plurajn demandojn de la ĉeestantoj.

Tiamaniere, la Esperanto-Grupo de Valladolid daŭrigas sian konstantan agadon por la perfektigo de la lingvo inter siaj membroj.

Ceestanto

ELSTARA
ESPERANTISTO
VIZITIS
NIAN
URBON



La Valladolid-a Grupo ricevis en sia sidejo la viziton de grava esperantisto Dro. Lajos Lesznai el Hungario, akompanata de sia edzino.

Okaze de turismvojaĝo tra Hispanio, S-ro. Lesznai kaj edzino pasigis 5 tagojn en nia urbo, vizitante la ĉefajn artaĵojn. La estraro de "Fido kaj Espero" profitante la okazon, invitis lin prelegi en nia sidejo pri sia Lando.

La 19an de Aprilo je la 8,30 vespere S-ro. Lesznai per fluaĵaj vortoj prelegis esperante pri "Hungario kaj la hungaroj". Li komencis dirante ke lia Lando estas malmulte konata en Hispanio, kaj tion li konstatis, kiam li parolis kun hispanoj. Pro tio, li deziras klarigi plu pri tiu temo. La preleganto komencis citante la geografiajn limojn de sia Lando, dirante ke Hungario pro sia geografia situacio kaj ankaŭ pro sia historio estas konsiderata kiel limo inter Oriento kaj Okcidento.

Hungario estas granda ebenaĵo kun du gravaj riveroj kiuj trapasas la landon: Danubo kaj Tzisa.

Ĝiaj enloĝantoj havas tre diversajn karakterojn, konsekvenco de turkaj kaj aliaj migradoj, ĉar estis la finnaj gentoj kiuj unue migris ĝis la nuna Hungario, kun sia lingvo, kaj tie miksiĝis kun aliaj lingvoj. Pro tio, la hun-

gara lingvo ne evoluis kiel la aliaj naciaj lingvoj, kaj ĝi havas parencecon nek kun la germanidaj, nek kun la slavidaj, nek kun la latinidaj lingvoj, ĉar ĝi estas tute malsimila. La plej proksima, eble, estas la finna lingvo.

Historie, klarigis la preleganto, la mongoloj detruis la Landon kaj post ilia foriro, ĉio estis denove rekonstruita, atingante la plej brilajn jarojn dum la XV.^a jarcento dum la regado de Reĝo Matias; sed la turkoj ankaŭ minacis kaj konkeris parton de la Lando, detruante, denove, multajn artaĵojn, kaj tio estis la kaŭzo ke Hungario restis pli longe en Mezepoko, dum aliaj landoj evoluis.

Dum la 19a jarcento estis necese, por atingi sendependencon, batali kontraŭ la Habsburga dinastio ĝis la fino de la 1.^a Mondmilito. Post la 2.^a Mondmilito estis necese, denove, konstrui novan Hungaron.

Nun, Hungario, estas lando kies enloĝantoj legas, diris la preleganto, ĉar ĝi kun pli ol dek milionoj da enloĝantoj, posedas 89 Universitatojn kaj Altlernejojn. Ĉiujare aperas multaj novaj libroj, kaj inter ili multaj esperante.

Pri la arto, li diris, ekzistas, ankaŭ, gravaj artaĵoj kaj la hungaraj muzikistoj estas jam famaj en la tuta mondo.

Fine, Sro Lesznai diris ke en Hungario ekzistas grava esperantista movado, nur en Budapeŝto estas pli ol 15 Grupoj.

Sro. Lesznai estis atente aŭskultata de la tuta ĉeestantaro kiuj premiis lian interesan prelegon por tondra aplaŭdado.

Poste Sro. Lesznai projekciis diapozitivojn pri sia Lando, ja interesajn.

Je la fino kaj invititaj de la Grupo, ĉiuj ĉeestantoj iris al apuda ĉambro por gustumi hispanan vinon.

La 20an, dimanĉon, 18 gesamideanoj kunvenis en grava restoracio de la Urbo por inviti la hungaran paron.

M. R. Urueña

17.^a KATALUNA ESPERANTISTA RENKONTIGO

Okazonta en Girona la 13-an kaj 14-an Septembro 1975

Akceptejo: Colegio Menor "Obispo Cartaña", en str. Antich Roca

PROGRAMO

- 13-an je la 19,30 h. Inaŭguro de Esperanto-Ekspozicio en "Casa de la Cultura" (Plaza Hospital).
21,15 h. En la aŭditorio de "Casa de la Cultura" publika prelego fare de S-ro Ramón Molera, pri la temo "Per Esperanto tra Europon".
- 14-an je la 9,30 h. Akceptado de la partoprenantaro.
11,30 h. Meso kun prediko en Esperanto; ĝin celebros P. Manuel Casanoves CMF, en la paroĥejo "San José" (apud la akceptejo).
12,— h. Arta festivalo, en la aŭditorio de la akceptejo.
14,30 h. Frateca kunmanĝado en hotelo "Mirallac" en Bañolas (fronte al la lago).

Libroservo troviĝos disponebla por la libroamantoj.

Prezo de la konmanĝado: 285 ptoj. Rezervo de sidlokoj por ĝin partopreni, ĉe S-ro Santiago Torné Grau, Roca, 22, 3.^a-2.^a, SABADELL (Barcelona), ĝis la 8-a.9.1975.

1.^a ARTA JUNULARA FESTIVALO

Per sprita afiŝeto, la Junulara Sekcio de la Centro de Esperanto Sabadell anoncis la 1-an Artan Junularan Festivalon, kiu okazis la 8-an de junio.

Bedaŭrinde, la anonco alvenis al la Redakcio de BOLETIN tro malfrue por ĝin aperigi en pasinta numero de nia revuo.

Pri la sukceso de la festivalo ni ne dubas. Koran gratulon al la organizintoj.

Kiel anoncote en pasinta numero de BOLETIN, la Sarlanda Esperanto-Ligo konscia de la problemoj ekestintaj per la forlaso de la principoj de neŭtraleco kaj demokrateco, fare de la nuna UEA, post intensaj interparoloj kun diversaj aktivuloj en la Esperanto-movado kaj funda analizo de la posthamburga situacio de UEA, decidis organizi Internacian Konferencon kun la kadra temo: "La lingva problemo en la nuntempa mondo kaj la aktualaj taskoj de la neŭtrala Esperanto-movado". Prof. Dro. Ivo Lapenna konsentis fari la enkondukan prelegon kaj partopreni en la laboroj de la tuta konferenco.

La neŭtralaj esperantistoj bonvenigis tiun decidon de niaj germanaj samideanoj kun ĝojo kaj danko ĉar, de nun, ili denove povos —internacie organizitaj— labori por kaj per Esperanto en la solvo de la monda lingvo-problemo laŭ praktikaj metodoj bezonataj de la moderna vivo, sed ankaŭ laŭ la spirito de Dro. Zamenhof; tio estas, neŭtrale kaj demokrate, nepra kondiĉo por homa kunfratiĝo.

Bedaŭrinde ĉijare la Konferenco estis anoncita tro malfrue, kaj pluraj samideanoj, kiuj volonte partoprenus ĝin, devas rezigni sian deziron; sed ni ankaŭ povas elmontri nian solidarecon kaj fidelecon al la Zamenhofaj principoj pere de nia aliĝo kaj helpo en la diskonigo de la,

UNUA INTERNACIA KONFERENCO DE LA NEŬTRALA
ESPERANTO-MOVADO

10-17 Aŭgusto 1975, Universitato de Sarlando, Saarbrücken, FRG
Honora Protektanto, Prof. Dro. Hans Faillard la Prezidanto de la Universitato

PROVIZORA PROGRAMO

A. PRELEGOJ KAJ DEBATOJ

Enkonduka prelego: Prof. Dro. Ivo LAPENNA (Britujo): La monda lingvo-problemo kaj la rolo de la organizita Esperanto-movado.

Informado: André BOURDEAUX (Francujo): Modernaj principoj de informado.

N. N.: La graveco de objektiva informado de la Esperanto-gazetaro.

N. N.: Sciencaj esploroj kiel bazo de efika informado.

Heinz Dieter MAAS (FRG): Nuna stato de maŝin-tradukado.

Instruado: Günther BECKER (FRG): Rimedoj de lingvolernado.

Prof. Dro. Max MANGOLD (FRG): Lingvistikaj konsideroj pri la facila lernebleco de Esperanto.

Jean THIERRY (Francujo): Efika memlernado de Esperanto.

Klerigado: Reinhard HAUPENTHAL (FRG): Triŝtupa klerigado de la esperantistoj.

Organizado: Helmut SONNABEND (FRG): La rolo de ILEI en la neŭtrala Esperanto-movado.

Marianne VERMAAS (Nederlando): Administraj problemoj de la organizita Esperanto-movado.

Post ĉiu prelego okazos vasta diskuto kaj apartaj kunsidoj en laborgrupoj. En la lasta tago de la Konferenco okazos ĝenerala diskuto, rezulte de kiu oni formulos la ĉefajn konkludojn.

B. OFICIALAJ ARANĜOJ

Publika forumo (podia diskutado) en la universitato; — Gazetara konferenco; — Akcepto ĉe aŭtoritatoj; — Vizito de la komputera centro.

C. LIBERTEMPA PROGRAMO

Tagekursuro al Trier (1975-08-15); — Rondveturo tra Saarbrücken; — Vizito al Bexbach kaj Homburg (Mineja muzeo kaj sabloŝtonaj kavernoj).

En Saarbrücken mem troviĝas la German-Franca Ĝardeno kun multaj ripoz- kaj amuzeblecoj.

Ĉiu aliĝinto ricevos la detalan definitivan programon.

La aliĝkoto estas 20,— DM. La nombro de la aliĝoj estas limigita al 100. Limdato por aliĝo estas 1975-08-01.

Konstanta adreso: Sarlanda Esperanto-Ligo r. a., Franz-Schubert-Str. 26, D-6602 DUDWEILER.

Hispanaj interesigantoj petu la aliĝilon kun programo kaj interesaj informoj ĉe Inés GASTON, P.^o Marina Moreno, 35, 4.^o dcha. ZARAGOZA.

REVUO DE LA REVUOJ

La s-ro redaktoro de ESPERANTO denove surprizas nin per unu el siaj vere kolektindaj rimarkoj. Temas ĉi-foje pri la prezento de la enhavo de ESPERANTO (n.^o 832, aprilo 1975). Sur ĝia dua paĝo, s-ro Milojeviĉ skribas interalie:

«Eventuale vi rimarkos, ke ni ankaŭ en ĉi tiu numero sukcesis rezisti al la malnov-stilaj defioj, kiujn direktis al nia revuo iuj aliaj movadaj periodaĵoj. Nu, ne temas pri tio, ke ni ne havas kion diri, sed pri la fakto, ke ni nek volas, nek trovas tempon okupiĝi pri tiuj bastonoj celantaj haltigi la radon de la neŭtrala Esperanto-movado.»

Antaŭ ĉio ni devas gratuli la s-ron redaktoron pro lia interesa eltrovo, ke ekzistas defioj de 'malnova stilo' kaj, implicate, de nova stilo. Bedaŭrinde, s-ro Milojeviĉ ne ĝenas sin klarigi la diferencon inter unu kaj la alia. Eble la "defioj" de nova stilo estas pli elegantaj kaj respektindaj ol la malnovaj.

Sed plej enigma estas, ke la s-ro redaktoro ne volas mencii la nomojn de "la bastonoj". Kial? Ĉu la legantoj de ESPERANTO estas tiel nematuraj, aŭ tiel nefidindaj, ke oni devas ne informi ilin pri aferoj, kiuj rekte tuŝas ilin kiel esperantistojn?

Ĉar s-ro Milojeviĉ envolvas sin en la misteron, ni devas fari konjekton rilate la sencon de lia kabalajo. Ni supozas, ke s-ro Milojeviĉ ne aludis nian organon BOLETIN, ĉar li volonte mencias ĝian nomon, kiam li alpafas kontraŭ ĝi sian indignon. Jam en januaro ĉi-jara, li skribis en ESPERANTO, ke "en la periodaĵo de la Hispana Esperanto-Federacio, BOLETIN, komencas aperi kontribuadoj, kies celo estas subfosi la fidindecon de la novaj gvidorganoj de UEA". Rekte kaj klare, ĉu ne?

Okazas, tamen, ke la solaj "defioj" al UEA —mi ne scias, ĉu malnov-stilaj aŭ nov-stilaj— aperas en "movadaj periodaĵoj" de orientaj landoj eŭropaj. Mi ripetu, ĉar ekzistas personoj kun tre malbona memoro, kion diris, por ekzemplo, STARTO, 6 (44) 1974, organo de la Ĉeĥa Esperanto-Asocio:

«UEA, same kiel ĉiuj aliaj organizaĵoj celantaj la internacian sferon, estas devigata respeguli objektivajn ŝanĝojn en la internacia vivo. Ĝi ne povas neglekti ilin, se ĝi mem ne volas esti neglektata. Interne de UEA oni ne povas malatenti la kvantan fortiĝon de la asocioj el la socialismaj landoj, kaj sekve ankaŭ enradikiĝon de la novaj tendencoj en la aplikado de la internacia lingvo. La esperantistaro atendas de la nova estraro, ke ĝi respektos ilin.»

Eĉ ne la kokoj kantas pli klare kaj pli laŭte!

La kerno kaj la esenco de la afero konsistas en tio, ĉu s-ro Milojeviĉ pensas, ke la deklaro de ĉi tiu "movada periodaĵo" devas esti rigardata kiel atenco kontraŭ la neŭtrala Esperanto-movado, aŭ male, kiel fidela interpreto de la oficiala linio de UEA. Se vi, sinjoro Milojeviĉ protestas kontraŭ BOLETIN, klare menciante ĝian nomon, same protestu (se vi povas, aŭ kuraĝas) kontraŭ la vere veraj "bastonoj", skribante iliajn titolojn. Kaj se vi opinias, ke tiaj "movadaj periodaĵoj" respektas la neŭtralecon, nu, sentime konfesu tion, por ke viaj legantoj sciu per unu fojo kian specon de neŭtraleco praktikas UEA.

HEROLDO DE ESPERANTO, n.° 7 (1578), 16-4-75, dediĉas plenan paĝon pisti, draŝi, mueli kaj haki la jam faman verkon "Esperanto en Perspektivo", kies aŭtoro estas d-ro Ivo Lapenna en kunlaboro kun d-ro Tazio Carlevaro kaj s-ro Ulrich Lins. La ferocan atakon lanĉis precipe s-ro G. C. Fighiera. Komprenoble, ne estas mia intenco komenti la artikologon de s-ro Fighiera, des malpli ke, prefere ol la libron, li atakas la personon de d-ro Lapenna, do al ĉi lasta apartenas fari la rebaton, se li opinias, ke valoras la penon respondi tiel belan modelon de pamfleta ĵurnalismo (ĉu nov-stilan aŭ malnov-stilan, s-ro Milojević?). Mi nur deziras tiri la atenton de la leganto al ĉi tiu lasta alineo de la enkonduko al la artikolo:

«Car en la pritaksoj esprimiĝas pluraj negativaj opinioj, mi malfruigis la aperigon de la recenzoj kelkajn monatojn; ni ne volis, nome, ĝeni UEA en la lanĉo kaj komenca vendado de la verko, kiun ĝi eldonis en 3.000 ekzempleroj kaj en kiu ĝi investis kapitalon ne malproksiman de 100.000 guldenoj, enalkulante la laboron de la Centra Oficejo.»

Kion pensi ĉe tiel eksterordinara deklaro? Kvankam s-ro Fighiera havas la absolutan konvinkon ke "Esperanto en Perspektivo" meritas nur la fajron de la infero, li, anstataŭ tuj averti al siaj fidelaj legantoj pri la forĵetindeco de la volumo, preferis silentegi kelkajn monatojn, nur por ke ili aĉetu la libron kaj helpu tiel la financon de UEA. Tio ne ŝajnas lojala konduto rilate al la legantoj. Kaj cetere, ankaŭ ne rilate al UEA, ĉar, pro lia senkompata atako, sendube aliaj ĝisostaj "heroldanoj" rifuzos akiri la verkon, ĝuste kiam, laŭ anonco de UEA aperinta en ESPERANTO de majo ĉi-jara, ĝis nun vendiĝis 600 ekzempleroj el la eldonitaj 3.000. Resume, s-ro Fighiera malfidelas unue kontraŭ siaj legantoj kaj poste kontraŭ UEA. Kaj, krome, li senĝene konfesas tion! Se li kondutas tiel al siaj amikoj, oni perfekte komprenas, ke li trempas sian plumon en galon, vitriolon kaj venenon por skribi tiel verve kaj elokvente pri siaj malamikoj!

—oOo—

LITERATURA FOIRO, n.° 28, decembro 1974, aperigas la artikolon "La brosproblemo" verkitan de d-ro I. Szerdahelyi, kie li faras nombron da asertoj tre diskutindaj. D-ro Szerdahelyi ne akceptas la gramatikan kategorion de la morfemoj kaj pretendas rebati en sia artikolo la kontraŭan opinion de prof. Waringhien. D-ro Szerdahelyi asertas:

«La sistemo de vortfarado en Esperanto estas tiom komplika, eble eĉ pli, ol en kelkaj naciaj lingvoj. Same la sintaksa parto de PG (fakte franca sintakso) demonstras ne la facilecon, regulecon kaj planitecon de la lingvo, sed ĝian komplikecon. Ni devas do serĉi kaj trovi multe pli simplan, pli konsekvencan, pli adekvatan al la lingvo-priskribo modelon.»

Ŝajnas al mi, ke PG surbaze de la facileco, reguleco kaj planiteco de la lingvo, esploras kaj difinas ĝian parton de komplikeco. Sed, kion fari? Absolute enia modelo de lingvo-priskribo povus simpligi tion, kio en si mem estas komplika.

D-ro Szerdahelyi aldonas pli antaŭe:

«Vole nevole ni devas do konscii, ke broso, martelo kaj aliaj similaj iloj en esperanto aperis nepripensite, hazarde kaj kontraŭas la pli ĝeneralan, pli konsekvencan kaj pli dinamikan kaj produktivan formon haki/hakilo, balai/balailo. La solvo do estas: ni konceptas tiun fenomenon kiel escepton, aŭ ni premesas la paralelan uzon de brosil.»

Je Dio, doktoro! Tio kondukus nin al la absurdo allasi ankaŭ —kial ne?— la esprimojn spronilo anst. sprono, bandaĝilo anst. bandaĝo, tenajlilo anst. tenajlo, vipilo anst. vipo, kaj tiel senfine. Kaj kion signifus sprono, bandaĝo, tenajlo, vipo ktp.? Ĉu ili egalas al verbaj substantivoj similaj al spronado, bandaĝado, tenajlado, ktp.? Ĉu tio ne puŝus nin rekte al la derivsistemo de Ido?

Mi opinias, ke prof. Waringhien trafas la ĝustan klavon, kiam li diras en paĝoj 97-98 de sia epokfara libro "Lingvo kaj Vivo":

«Estas kelkaj radikoj, kiujn oni povus meti en alian kategorion ol tiun elektitan de la aŭtoro de Esperanto. Ekz. la radikoj abomen', agac', ktp. kiuj estas substantivaj, povus esti egale bone konceptataj kiel verbaj; argument', arm', ktp. klasitaj kiel verbo povus esti apriorie rigardataj kiel substantivoj; atent' estas adjektivo, sed ĝi teorie estus klasebla kiel verbo ktp. Kion konkludi pri ili? Evidente la uzanto de la lingvo estas devigata lerni ĉe ili ne nur

la signifon, sed ankaŭ al kia kategorio ili apartenas: sed tiun plian ŝarĝon oni ne povas evitigi al li. Guste ĉar la ideo esprimita de tiuj radikoj estas plurvizaĝa, iu aŭ io ja devis nepre decidi pri ilia gramatika karaktero. Tia leĝodona aŭtoritato estas la Fundamento.»

Ke, laŭŝajne, d-ro Szerdahelyi pretendas, eĉ se teorie, meti "ordon" en la strukturon de Esperanto, ignorante la gramatikan kategorion de la morfemoj, mi absolute ne povas kompreni, ĉar, se oni ne observus tian kategorion, Esperanto ĉesus ekzisti aŭ transformiĝus en alian Idon.

Sendube d-ro Szerdahelyi estas kompetenta lingvisto-fakulo, same kiel d-ro Janton, sed, de la momento kiam li distanciĝus, en la praktiko, de la Fundamenta bazo de Esperanto, li estus ankoraŭ lingvisto-fakulo, sed ne jam esperantisto. La VERO ne ekzistas, d-ro Szerdahelyi, kaj des malpli en konvencia fenomeno, kia estas lingvo. La lingva konvencio de Esperanto nomiĝas Fundamento, kaj se ni komencus denove serĉi en ĝi —por la kioma fojo?— pli da logiko, pli da natureco, pli da simpleco, kaj eĉ la VERON kun majuskloj, tiam ni havus ne Esperanton, sed nombron da diversaj derivaĵoj.

Unu sinjoro volas nuntempe modifi la ortografion kaj la prononcon de Esperanto, ĉar li aspiras pli grandan naturecon kaj simplecon; aliaj sinjoroj volas modifi la sintakson kaj la vortfaradon, ĉar ili deziras pli da reguleco kaj logiko. D-ro Szerdahelyi volas la VERON.

La kompatinda Zamenhof, kiu ne estis lingvisto-fakulo, konis tamen la elementan fakton, ke la konceptoj de logiko, natureco, simpleco, reguleco, ktp. varias de popolo al popolo kaj eĉ de persono al persono, kaj ke, sen la ekzisto de deviga konvencio lingva, Esperanto disidiomiĝus kaj disdialektiĝus, kiel instrue pruvis siatempe la fenomeno Ido.

Sed ŝajnas, ke ĉiun duan aŭ trian jardekon, kun monotona periodeco, la esperantistoj devas suferi la saman tedan plagon da naturuloj, ortografiuloj kaj logikuloj, eble kiel punon de la ĉielo pro niaj tre multaj pekoj.

Kaj kun plej sinceraj salutoj kaj bondeziroj, ĝis la proksima revu-rikolto, via

F. de Diego

60.^o UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Okazonta en Frederiksberg (Kopenhago) Danlando de la 26^a de julio
ĝis la 2^a de aŭgusto 1975

Alta Protektanto: Anker Jørgensen, ĉefministro de Danlando

Informoj riceveblaj ĉe la konstanta adreso de la Kongreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam - 3002 Nederlando.

Estas dissendita la Dua Oficiala Bulteno de la Kongreso, belaspekta 32-paĝa ilustrita kajero kun interesaj informoj.

Statistiko: (ĝis la 20-a.4.1975).

Entute 941 aliĝintoj el 43 landoj (Hispanoj 13).

INFORMACION

Siendo varios los esperantistas que continúan escribiendo a la familia del Dr. Tudela para preguntar si pueden seguir haciendo sus pedidos de Vocabularios a la misma dirección, informamos para general conocimiento, que pueden seguir haciendo sus pedidos a nombre de: Amparo Tudela Pla, c/ Ruzafa, 41, Valencia-6, por ser ella quien se ocupa del suministro de los Vocabularios, de que era autor su padre.

A la vez advertimos que ya sólo queda existencia del Vocabulario Español-Esperanto y del Diccionario Elemental Español-Esperanto y Esperanto-Español.

Asimismo el Libroservo de la Federación tiene a la venta los Vocabularios del Dr. Tudela.

Ni legis por vi...

INTERESA ARKEOLOGIO, de Marinko Ĝivoje. Eldono: Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), Parizo, 1973. Formato 10,7 × 17,2 cm. 66 paĝoj, kun abundaj fotoj kaj desegnoj, broŝurita. Prezo: 140 ptoj.

Temas pri fasko da arkeologiaj temoj verkitaj, en plaĉa stilo kaj flua lingvo, de la konata aŭtoro de *Ŝekretoj de la mar-estaĵoj*. Komprenible, la libro nek estas, nek pretendas esti sistema traktato arkeologia, sed havas la meriton fari leginda kaj interes-kapta sciencan fakon, kiu unuavide ŝajnas teda al ni, laikoj. La verko, en sia kategorio de vulgarigaĵo, tre bone plenumas sian celon. Bela libro-premio por la plej diligentaj lernantoj de niaj junulaj kursoj!

Fernando de Diego

KARNAVALO, de Lina Gabrielli. Eldono: Karol Kleszczyński. International Center of Arts, Roma, 1973. Formato 14 × 20,3 cm. 80 paĝoj, broŝurita. Prezo:

Karnavalo estas la titolo de la ĉefa el kvin rakontoj, kiuj formas la libron. Jen la titoloj de la aliaj pecoj: *Solutino*, *Pieroto*, *Libertempo en Venecio*, *Unu Jaro kaj Duono*. La rakontoj, facile legeblaj kaj legindaj, ne nur distras, sed ankaŭ igas nin pensi kaj simpatii kun la aŭtorino-protagonisto. Sento de minuskomplekso rolas kiel ĉefmotivo en *Karnavalo*, dum en la aliaj noveletoj la amo finas en solecon aŭ en timon al soleco. La senĝena tono de kelkaj partoj de la libro impresas kiel eleganta maniero kaŝi la amaron de sensiva kaj —ĉu ni diru?— intime malfeliĉa koro.

En *Solutino*, kelkaj frazoj en la angla devus aperi en pli ĝusta formo kaj ortografio. Sed la libreto estas absolute rekomendinda.

Fernando de Diego

LA STRANGA BUTIKO de Raymond Schwartz. Eldono de Dansk Esperanto-Forlag, Aabyhøj, 1974. 128 paĝoj, 14,5 × 25 cm. Prezo: 20 dkr.

Dank' al feliĉa kaj laŭdinda iniciato de Dansk Esperanto-Forlag, jen denove nia kar-memora Schwartz kun sia fabele riĉa sprito kaj sia petola bonhumoro. Relegi la burleskajn poemojn de *Verdkata Testamento* kaj de *La Stranga Butiko* konvinkas nin pri la enormaj kapabloj de Esperanto, pli ol mil teoriaj studoj.

Kiel prave diras Haupenthal en sia enkonduko, "en la arto de la vortludado, de la delikataj aludoj kaj senfinaj malkovroj, Schwartz restis originala kaj neelĉerpebla ĝisfine".

La *Verdkata Testamento*, kune kun *La Stranga Butiko*, de la sama aŭtoro kaj reeldonitaj de la sama eldonejo Dansk Esperanto-Forlag, akompanu vin kiel plej distraj amikoj en via somera ferio. Vi ne bedaŭros la elekton.

F. de Diego

PROVERBARO ESPERANTA de L. Ludoviko Zamenhof. Eldonis J. Régulo (Stafeto), La Laguna, Tenerifo, 1974. 168 paĝoj, 13,3 × 19 cm. Dua eldono. Prezo: 190 ptoj.

La fakto, ke en relative mallonga tempo, aperas ĉe Stafeto dua eldono de *Proverbaro Esperanta* indikas la kreskantan popularecon, absolute merititan, de ĉi tiu juvela libro de la kreinto de Esperanto. Neniu serioza esperantisto amanta la lingvon kaj ties belan esprimeblecon devus malhavi la *Proverbaron*, kiu estas modelo de frazeologio kaj de lingvo suka kaj populara. La libron riĉigas interesa enkonduko de prof. Gastón Waringhien, kaj indeksoj analiza kaj sinteza —iom tro komplikaj, mi konfesu— pretigitaj de Camille Register.

Libro absolute rekomendinda kaj aĉetenda.

LASTMOMENTA INFORMO

Jus aperis

HAMBURGO EN RETROSPEKTIVO

Dokumentoj kaj Materialoj

pri la

Kontraŭneŭtraleca politika konspiro en UEA

de

Ivo Lapenna

Eldonita de Sarlanda Esperanto-Societo

Sendependa neŭtrala organizaĵo

Prezo: 240 pesetoj



XXXVª Hispana Kongreso de Esperanto

Organizita de H. E. F., okazonta en Lérida

de la 18ª ĝis la 22ª de julio 1975

Adreso de la Organiza Komitato:

Apartado 88 - Lérida

PROGRAMO

18 julio

- 16-a horo — Kongresejo malfermita por disdono de dokumentoj, libroservo, informado, ktp.
22,30-a — Interkonatiga vespero en "Club Antorcha" (str. Mayor).

19 julio

- 11-a horo — Solena inaŭguro de la Kongreso en la Sindikata Domo (placo 18 Julio).
16-a — Inaŭguro de Esperanto-ekspozicio en la ekspozicia salono de la "Caja de Pensiones para la Vejez y Ahorro de Cataluña" (Sparkaso). Laborkunsido de la Estraro de H.E.F. kun Deleĝitoj de Grupoj kaj Sekcioj. Fakaj laborkunsidoj.
20-a — Katolika meso en Esperanto kun prediko en la antikva "Seo". Je la fino en la klostro de la "Seo" Koncerto de "Coral Sicoreis".

20 julio

Tuttaga ekskurso al "Valle de Arán".

21 julio

- 10-a horo — Oratora Konkurso organizita de Fundación ESPERANTO.
12-a — Inaŭguro de strato Dr. Zamenhof. Sekve Oficiala akcepto en la Urbodomo fare de la Magistrato de Lérida.
16,30-a — Ĝenerala Kunveno de H.E.F. en la "Escuela Normal de Magisterio" (str. General Yagüe).
20-a — S-ro Gabriel Mora Arana prelegos en Esperanto pri la temo "Poetoj kaj artistoj en Lérida", en salono de sama Altlernejo.

22 julio

- 10-a horo — Vizito al la bier-fabriko "San Miguel". Vizito al la Ekspozicio de tapiŝoj en la Katedralo (str. Mayor).
19-a — S-ro José M.ª Rasquín prelegoj en hispana lingvo pri la temo "El Esperanto y el problema lingüístico mundial". La prelego okazos en la "Sala Magna" de la Instituto de Ilerdensaj Studoj. Sekve okazos la Solena fermo de la Kongreso.
22-a — Oficiala bankedo en Hotelo "Condes de Urgel".

Akceptejo kaj Kongresejo: Instituto de Ilerdensaj Studoj (str. Mayor).